

# ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Vol. 2, N-ro 12

Decembro 1938

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo,  
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG  
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

## Esperanto en grava filmo

### Fama filmreĝisoro Clarence Brown

dankas kaj gratulas, samtempe sin  
turnante al ĉiuj redaktoroj de  
Esperanto-gazetoj.

Jam antaŭ kelkaj monatoj ni eksciis el fida fonto ke la plej grava usona filmfarejo Metro-Goldwyn-Mayer intencas uzi Esperanton por parto de la dialogo en grava filmo « *Idiot's Delight* » (Amuzo de Idioto). Sed tiam la afero ankoraŭ ne estis decidita. Nun tiu filmo estas farata, kaj la filmfarejo komisiis al nia konata samideano kaj kunlaboranto Joseph R. Scherer la zorgon pri la bona funkciado de l' esperantlingva parto de la filmo. La filmo estas turnata sub la direktado de la konata filmreĝisoro Clarence Brown. Respondante al gratulletero de nia redaktoro, pro la uzo de Esperanto en la dirita filmo, la fama reĝisoro direktis al s-ro Teo Jung, kiu estas ankaŭ la redaktoro de la semajna « *Heroldo* », la jenan leteron :

Estimata sinjoro redaktoro,

Mi dankas pro via letero kaj pro viaj gratuloj pri la elekto de Esperanto por parto de la dialogo en la nova filmo « *Idiot's Delight* ».

Laŭ mia scio mi estas la unua filmreĝisoro en Hollywood kiu uzas Esperanton en grandskala filmo. Ludas en ĝi Norma Shearer kaj Clark Gable kaj multaj aliaj bonaj geaktoroj. S-ro Joseph R. Scherer estas la Teknika Konsilanto por la Esperantaj aferoj.

En antaŭaj numeroj de « *Heroldo de Esperanto* » mi vidis, kiel vi jam ofte faris grandan reklamon por la ideo de Esperanto en filmoj. Jam de multaj jaroj mi pensis ke Esperanto povas esti tre utila por la filmoj kun internacia intereso. Kaj mi ĝojas ke mi estas la unua reĝisoro kiu nun uzas vian lingvon por mia nova filmo.

Mi dankas al vi kaj al ĉiuj aliaj redaktoroj de Esperantaj gazetoj pro ĉia reklamo kiun ili donos al tiu ĉi afero. Bonvolu sendi gazetnumerojn kaj aliajn pruvojn pri via reklamo por la filmo! Permesu al mi gratuli VIN pro la baldaŭ aperonta 1000-a numero.

Sincere via  
Clarence Brown.

### Metro-Goldwyn-Mayer urĝe bezonas Esperantajn geaktorojn

De Joseph R. Scherer, Prezidanto de  
E. A. N. A.

Neniam mi revis ke mi mem foje devos elekti geaktorojn por la kolosa film-farejo M.G.M. en Hollywood.

Same kiel milionoj da legantoj de filmrevuoj mi ofte legis pri dekmilo da statistikoj (« *Extra* ») kaj pri miloj da plimalpli gravaj geaktoroj, kiuj ĉiutage sidas ĉe la telefono kun altaj esperoj. Ili esperas ke unu el la 50 film-farejoj de Hollywood alvokos por venigi ilin al unutaga aŭ kelktaga aŭ eble eĉ kelksemajna laboro.

Ili ricevas de \$ 5.00 ĝis \$ 100.— por unutaga laboro. Plej ofte malpli ol \$ 15.—. Sed ofte tia aktoro aŭ aktorino havas nur 2-3 labortagojn en tuta monato. Kaj ili devas pasigi la reston de la monato apud la telefono, ĉar ili devas tuj veni kiam film-farejo vokas. Se la aktoro ne tuj ĉe la telefono povas diri : « Jes, mi estas libera », la film-farejo vokas aliajn.

Nun subite mi sidis en oficejo de M. G. M. kaj devis « venigi geaktorojn kiuj povos paroli Esperante » en filmo kiu estos grandskala kaj sensacie mond-fama.

La ĉefo de la dunga fako vokis 35 geaktorojn kiuj laŭ informoj estas taŭgaj tipuloj kaj laŭdire parolas Esperanton. Ĉe la telefono ĉiuj tuj diris, ke : « Jes, jes, certe mi parolas Esperanton » — sed ili tion diris angle, itale aŭ hispane. Iliajn nomojn mi ne konis, kvankam mi estas loka kaj nacia prezidanto de multaj jaroj. Mi kredis ke mi konas persone ĉiujn gesamideanojn en Usono...

kaj jen : 35 geaktoroj kiuj emfaze asertas ke ili scias la lingvon pli bone ol iu alia homo en Hollywood kaj Los Angeles !

La dunga direktoro diris tra la telefono : « Do venu rapide por intervjuo en la M.G.M. ! ». Post du horoj ĉiuj estis intervjueblaj.

La dunga ĉefo bonvenigis ilin per intertempe lernitaj frazoj : « Bonan matenon ! », « Ĉu vi parolas Esperanton ? ». La ĉefo ankaŭ jam sciis kion ili devus respondi.

Sed ĉiuj respondis itale aŭ hispane kaj jam sin perfidis. Mi sidis en angulo de la sama ĉambro kaj miregis pro la kolosa blufado de la geaktoroj. Kiam la ĉefo prezentis min kiel la nacian prezidanton, ... iliaj vizaĝoj ŝanĝis la koloron. Jen unufoje, kie blufado ne helpis !

Nur du povis respondi al demando kun unu pure Esperanta vorto : « KIE vi lernas Esperanton ? », sed eĉ ili ne uzis korekte la akuzativon. Tamen ili foje estis samideanoj, kaj do ili jam havis avantaĝon.

Kion fari ? Ĉu elekti membrojn de la Los-Angeles'a Esperanto-Klubo ? Tio ne estis ebla, ĉar mi bezonis verajn geaktorojn kaj certajn tipulojn por certaj roloj. Lokaj gesamideanoj ne ludis profesie tiajn tipulojn en teatraĵoj aŭ filmoj.

La filmfarejoj povas dungi nur geaktorojn kiuj apartenas al la geaktora gildo. Por aliĝi al la profesia gildo, oni devas pagi \$ 18.— ĝis \$ 35.— jare, kaj la gildestro volas unue konvinkiĝi ke la samideano estas sperta aktoro. Sen tio gilda karto ne estas havebla, kaj sen ĝi la filmfarejo ne povas dungi.

Nur se temas pri speciala rolo, la filmfarejo povas postuli tujan membrigon en la gildon, sed M.G.M. ne sciis pri specialaj aktoraj talentoj de lokaj gesamideanoj kaj ne havus tempon por riski mal-

lertecon dum la filmado flanke de nepertaj personoj.

El la amaso da blufuloj mi sidigis dek-on en mia oficejo kaj donis al ili kelkajn liniojn por legi :

*Mi diras al vi,  
Kiam la milito venos,  
Ni restos ekster ĝi.  
Aliaj batalu inter si  
ĝis la morto ;  
Estos des pli bone por ni.*

Post klarigado ili laŭvice legis la saman linion du-trifoje. Poste, unu post alia, ili legis la duan, trian, kvaran liniojn. Mi notis la lertecon ĉe elparolado post ĉiu nomo. Same mi notis, ĉu la voĉo kaj vizaĝo de ĉiu taŭgas por la diversaj roloj. Poste mi petis ke ili laŭvice montru kiom bone ili rememoras la liniojn, kiujn ili ĵus aŭdis 20-30-foje.

Nur kvar bone rememoris. Aliaj ĉion miksis. Mi ankaŭ tion notis. Tri-kvar estis 80-90 % perfektaj en ĉiuj provoj. Aliaj bone elparolis sed absolute ne povis rememori la simplajn vortojn.

Kiel teknika konsilanto mi respond-ecis pri tio ke la elektitaj geaktorj ne eraru, kiam ili ludos kune kun *Norma Shearer* kaj *Clark Gable*. Pro tio mi volis eltrovi kiuj el la konkurantoj, kiuj jen ege klopodis, plej verŝajne ne forgesos siajn frazojn.

Kun miaj notoj mi iris denove al la dung-direktoro. Sed li respondis : « Nu, vi mem estos respondeca pri bona elparolado kaj pri glata funkciado — do vi mem dungu ! »

Mi skribis la nomojn de la plej bonaj sur paperon kaj sendis subĉefon ke li voku ilin al mi kaj diru al la aliaj ke mi bedaŭras... « sed eble alian fojon ili havos pli da ŝanco ».

Mi tre bedaŭris ke mi ne povis dungi pli multajn, ĉar ili ĉiuj ege deziris la laboron — kaj la bonan pagon. Neniam antaŭe mi dungs tiom da homoj samtempe kaj sub tiaj strangaj kondiĉoj. De tri gildmembraj gesamideanoj oni aŭdos la voĉon.

Tra mia kapo flugis la demando : « Kiom da ili nun subite vizitos la Esperanto-klasojn en Los Angeles???? »

★

En dua artikolo mi donos pliajn de-lojn pri la grandkala filmo kaj klarigos, **kial** Esperanto nun subite estas urĝe bezonata (por parto de la dialogo) de la unuaranga filmfarejo M.G.M. Mi klarigos **kiel la Esperanto-movado povos profiti grandskale** per tiu ĉi filmo... se la tutmonda samideanaro discipline kunlaboros laŭ vojoj kiujn mi klarigos en alia artikolo.

**Dume estos tre granda helpo** (por montri ke vere ekzistas esperantistoj multnombraj), se jam nun, tuj, multaj

# La memlingvo de Zamenhof

(Okaze de la 79-a datreveno de l' naskiĝotago de la majstro.)

Oni konas la leteron al iu islanda samideano (Orig. Verk., V 211), en kiu Zamenhof nomas la rusan sia gepatra lingvo. (En la senco metafora, kiam temas ne rekte pri la lingvo de la gepatroj, sed pri la karakteriza lingvo propra — ĝenerale identa al ĝi, sed ne ĉiam — oni preferu la vorton « memlingvo », kaj difinu ĝin kiel « la lingvon uzatan plej multe por envorta pensado kaj por parolado al oni mem ».)

De du flankoj venis duboj, ĉu tiu deklaro sufiĉas kiel pruvo, ke la memlingvo de Zamenhof vere estis rusa, aŭ ĉu eble en tiu letero Zamenhof celis ion alian ol precize la memlingvon laŭ donita difino. Unufanke la parencoj-Zamenhofoj postvivantaj dum lastaj jaroj pensis, ke hejma lingvo en familio Zamenhof de ĉiam estis Pola; aliflanke la eksterlandanoj lernis, ke la judoj orienteŭropaj hejme parolas judgermana, kaj miras kial Zamenhof estus escepto.

Estas utilaj do la jenaj klarigoj (parte bazitaj sur informoj de s-ano D-ro Emanuel Epsztejn en Wilno — nuntempe en Rozanka-Pacowska — por kiuj mi tre dankas lin). Ĝenerale la judoj polujaj havas kiel memlingvon la judgermanan, tamen kun du esceptoj. Unue ekzistas la grupo alsimiligema, kiu transprenas la lingvon ŝtatan: nun polan, antaŭe rusan. Due estas judoj, kiuj principe volas esti kaj resti judoj, sed kiuj malŝatas lingvon judgermanan, aspektantan por ili kiel germana kripligita, kiel simbolo de sklaveco. Tiu dua grupo nuntempe uzas novhebrea, per ĝi atingante grandajn sukcesojn kaj influon; dum antaŭa jarcento, kiam novhebrea ne jam ekzistis, ankaŭ tiuj ideologoj prenis rusan. la lingvon ne nur de la ŝtato, sed samtempe de profetoj humanecaj, de pasie ad-

naĉiaj societoj, kluboj, delegitoj kaj individuaj gesamideanoj sendos al la film-reĝisoro Clarence Brown (kiu postulis Esperanton) amason da gratul-leteroj pro la uzo de Esperanto. Bonvolu menci la aŭtoron de tiu ĉi artikolo kaj la gazeton, en kiu vi legis ĝin !

Estos pli efike, se vi samtempe promesos ke vi faros multan reklamon por tiu ĉi filmo « *Idiot's Delight* » (Amuzo de Idioto) en viaj regionoj. Reĝisoro Brown respondos ĉiujn leterojn per afabla letero tute persona.

Estas neeble por mi verki apartajn artikolojn por ĉiuj Esperantaj gazetoj. Do la diversaj redaktoroj bonvolu kopii el mia nova artikol-serio tion kion ili povos plej bone uzi.

mirataj Dostoevskij, Tolstoj k.a. Eĉ sen rekta eldiro ni devus supozi, ke judo klera kaj idealema kiel Zamenhof en tiu tempo havis memlingvon rusan; la letero igas la supozon pruvita fakto. Pola memlingvo por tiu tempo apenaŭ estus pensebla ĉe kleraj judoj; ĝin ricevis la nova generacio, naskita en aliaj cirkonstancoj eksteraj kaj destinita al alsimiliĝo. Nia majstro konservis rusan memlingvon certe ĝis la morto, uzante eksteren ĉiujn lingvojn diversajn.

Restas ankoraŭ la demando, kiel verŝajne Zamenhof prononcis sian nomon. Ĝenerale tiaj nomoj evidente fremde-devenaj estas prononcataj laŭ origina lingvo, ne rusigitaj aŭ poligitaj. Tiam do « Zamenhof » laŭ prononco germana aŭ judgermana (ambaŭ estas identaj) havas akcenton sur unua silabo kaj «e» mutan.

★

*Nota.* Ĉi-tio estas aldonajo al longa verkaĵo pri la lingvosocioj de Zamenhof, publikigita de Hans Plehn en Literatura Mondo 1933 (Junio); Plehn traktas nur la sciojn entute, la demandon de la memlingvo li nur tuŝetas. Plej detale Plehn esploras anglan, kun rezulto ke « Zamenhof » scipovis ĝin, sed malpli bone ol aliajn lingvojn ». Tio intertempe estis bone konfirmata de Jan Medrkie-wicz, informanta (Heroldo 1934, n-ro 50, kaj 1935, n-ro 1) ke la Unua libro aperis en bonlingvaj eldonoj pola, rusa, germana, franca verkitaj de Zamenhof mem, sed en angla traduko (tamen malbonega) de iu Julian Steinhau.

La italajn lingvo-konojn Plehn konkludas el la italaĵoj de Esperanto! tial li indikas multajn Esperanto-vortojn kun formo itala, sed ekzistantajn aliaforme ankaŭ en franca, latina aŭ tiel plu (ekz. feliĉa, sveni). Kiel vorton nur italan li citas « ankaŭ », sed forgesas la alian : « gufo ».

Kiel aludon al eventualaj scipovoj svedaj Plehn konis nur iun kanton de anglaj esperantistoj, glorigantan ke la majstro studis « ĉiujn » lingvojn kaj speciale citantan interalie (nur pro la ritmo kompreneble!) « Skandinavian ». Pli serioza estas la konjekto intertempe farita, ke Zamenhof kreis vorton « ajn » laŭ sveda « än » (kiu en kazoj tre specialaj signife korespondas kun « ajn », sed nur en tiaj). Verŝajna ankaŭ ĉi tiu konjekto ne estas; se « ajn » ne estas tute artefarita, ĝi iomete povus esti sugestita nur de germana « irgendein » aŭ eble eĉ de aramea « ajnš = homo », uzata ankaŭ por nocio « iu ».

Hellmut Dibelius, Berlin.

# Esperanto je servo de Kulturo... per Radio

Pli ol tuta jaro jam pasis de post la momento, kiam ni komencis, en Parizo, la ĉiusemajnajn teatrajn radio-dissendojn. La Ministroj de Poŝto kaj Radio ektimis, ĉe la komenco, ke ni ne povos ĉiusemajne dum tuta jaro prezen-

ger Bernard, kaj Rollet de l'Isle.

Fine, 14 estis luditaj la unuan fojon.

Je la komenco alflugis al la radiostacio de Paris PTT multaj gratul-kaj dank-leteroj kaj poŝtkartoj. Sed iom post iom la nombro de tiuj skribaĵoj falis. Ĉu do la esperantistoj ne plu interesiĝas pri niaj laboroj? Tute ne, sed la teatraj dissendoj de Paris PTT jam fariĝis kutimo. Oni aŭskultas... sed forgesas danki. Sed, se je la fino de la jaro oni forigos tiujn dissendojn de la oficialaj programoj, la esperantistoj plen-

dos, grumblos kaj — skribos... tro malfrue, kiel kutime.

La franca radio konsideras la esperantlingvajn teatro-dissendojn tute same kiel tiujn en franca lingvo, kaj pagas al la partoprenantoj la ordinaran honoraron. En Paris PTT Esperanto estas vere enkondukita en la moderna vivo. Neniam plu ĝi devos malaperi! Pri tio la esperantistoj konu sian devon kaj nepre kaj regule skribu al: *Courrier des Amateurs, Esperantaj Dissendoj, 127 Rue de Grenelle, Paris 7.* Ni mem dankos ilin per radio-respondo.

P. Petit,

konstanta sekretario de SFPE.



**Sinjoro MARC DARNAULT**

estas la « animo » de la esperantlingvaj teatro-dissendoj ĉiulundaj el Paris PTT.

ti teatraĵojn en la internacia lingvo. Ni maltimigis s-rojn Lebas kaj Jullien, kiuj tiel amike fidis al ni.

El la 32 programoj prezentitaj ĝis la fino de julio nunjara, kvar estis verkitaj rekte en Esperanto: la du revuoj de Raymond Schwartz « Nek... nek... » kaj « Kio nova? », la skeĉo de Eva Jullien « Streko en la kalkulado » kaj « Johanino de Arko » de Marc Darnault. 21 estis tradukitaj el la franca lingvo, kaj ĉiuj gravaj flankoj de la franca teatra arto trovis tiamaniere sian lokon en la Esperanta literaturo: Molière unuavice, kaj poste Brueys, Labiche, Courteline, Ch. Richet, kaj inter la nunaj francaj teatro-aŭtoroj: Jules Romains, Romain Rolland, Charles Vildrac, Tristan Bernard, Henri Jeanson, Bernanose, René Jeanne, Pierre Mortier, S. Géraldy.

En la aliaj lingvoj ni havis sep teatraĵojn: du el la angla (Salome de Oscar Wilde, kaj la senmorta ĉefverko de Shakespeare: Hamlet, en la traduko de Zamenhof); po unu el la finna, hispana, kataluna, rusa kaj japana lingvoj.

Unu el la revuoj de Schwartz kaj « Johanino de Arko » de Marc Darnault estis verkitaj speciale por la radio.

Sep oni tradukis speciale por la radio-prezentadoj, kaj ni neniam tro dankus tiujn tradukintojn: Marc Darnault, Ro-

## Unua du-kolora poŝta stampo en la mondo:

Esperanto-stampo, uzita de la Brazila Poŝto okaze de Filatelia Ekspozicio « BRAPEX »

La 22-an de oktobro okazis ĉe la Palaco de la Belartoj en Rio-de-Janeiro la solena inaŭguro de la Unua Internacia Filatelia Ekspozicio en Brazilo, kiu efektiviĝis sub la honora prezidanteco de la Respublika Prezidanto D-ro Getulio Vargas, kaj sub la patroneco de la Ministroj de Trafiko kaj de Financoj. Ĝia Organiza Komitato publikigis du numerojn de speciala Bulteno kun teksto ankaŭ en Esperanto kaj ricevis centojn da leteroj kaj poŝtkartoj skribitaj en tiu ĉi lingvo, per kiuj oni petis alsendon de la Bulteno. Okaze de la Ekspozicio organizis Brazila Ligo Esperantista standon de Esperantaĵoj, kiu okupis spacon de 20 kvadratmetroj kaj estis vera allogaĵo.

Unu el la plej interesaj surprizoj de la Filatelia Ekspozicio, kiun oni ŝuldas al la Departemento de Poŝto kaj Telegrafo, estis sendube la tri specialaj stampiloj, el kiuj unu kun teksto en Esperanto. Certe specialaj stampiloj okaze de ekspozicio ne estas novaĵo, ĉar en aliaj okazoj oni uzis similajn stampojn. Tamen ni devas klarigi, ke la stampoj aplikitaj en la Filatelia Ekspozicio estis plulkoloraj! Ili estas elpensano de brazilano kaj nun unuafoje uzitaj. Per unu sola frapo oni faras multkoloran stampon. La Esperanta stampo estas dukolora. Post la stampado oni vidas sur la koverto aŭ poŝtkarto la verdan stelon. Tio estas tre agrabla surprizo precipe por la filatelistaj esperantistoj. La koverto, ĉi-supre reproduktita en iom malgrandigita formato, surhavas meze la dukoloran stampon (literoj nigraj, stelo verda).





# Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Herongate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

## Oficiala Informilo

N-ro 93. 27an de Oktobro 1938.

### NOVAJ DELEGITOJ.

**Aŭstralio**  
Sale (Victoria). — D: F. S. Chamberlain, Box 26, 7, Raymond Street.

**Brazilo**  
Alagoas. — D: A. Moreira da Silva, Sant' Anna do Ipanema.  
Recife (Pernambuco). — D: T. T. Villa Nova, Sindicato dos Uzineiros, Rua da Alfândega.

**Polujo**  
Warszawa. — FD (Koooperativismo): Jan Zawada, Skrzyńka poszt. 791, Warszawa I.

**Rumanujo**  
Mangalia (Dobrogea). — D: D-ro V. Petroff.

**Usono**  
Duquesne (Pennsylvania). — FD (Piedkuracistaj aferoj): D-ro I. L. Kinney, 38 First National Bank Building.

Reeder (North Dakota). — D: D. Toro.

### ŜANĜOJ.

**Aŭstralio**  
Swan Hill. — D: vakas pro translokiĝo.

**Brazilo**  
Matta Grande. — D: vakas pro translokiĝo.  
Rio de Janeiro. — FD (Katolikaj kaj skoltaj aferoj): adres-ŝanĝo; Rua Alice 33a.

**Britujo**  
Hastings. — D: vakas pro morto de S-ro Boutwood.

**Usono**  
Pharr (Texas). — D: adres-ŝanĝo; Box 428.  
C. C. GOLDSMITH,  
Ĝenerala Sekretario.



## INTERNACIA KONKURSO 1938 Stato je la 31a de Oktobro, 1938

	1937	Poentoj 1938	%
1. Bulgarujo	92	326	354.3
2. Svislando	137	468	341.6
3. Jugoslavujo	257	679	264.2
4. Polujo	318	683	214.7
5. Latvujo	55	111	202.0
6. Finnlando	61	102	167.2
7. Nov-Zelando	265	439	165.9
8. Litovujo	135	169	125.2
9. Nederlando	2837	3238	114.1
10. Aŭstralio	429	479	111.6
11. Kanado	74	79	106.7
12. Norvegujo	792	825	104.2
13. Belgujo	1722	1757	102.0
14. Usono	1513	1541	101.8
15. Britujo	6483	6575	101.4
16. Sud-Ameriko	851	822	96.6
17. Portugalujo	317	293	92.4
18. Francujo	5907	5441	92.1
19. Hungarujo	619	564	91.1
20. Italujo	636	561	88.2
21. Svedujo	3024	2632	87.0
22. Rumanujo	50	37	74.0
23. Ĉeĥoslovakujo	2449	1805	73.7
24. Afriko	137	99	72.3
25. Danujo	1118	755	67.4
26. Azio	1321	783	59.3
27. Aŭstrujo	789	311	38.9
28. Grekujo	137	—	—
<b>32525</b>	<b>31474</b>	<b>96.7</b>	<b>Meza%</b>

## Oficiala Informilo

N-ro 94. 3an de Novembro, 1938.

### NOVA ĈEFDELEGITO.

**Katalunujo (Hispanujo)**  
S-ro Rafael Gisbert Garcia, Av. 14 d'Abril, 338, 2. on.



### NOVAJ DELEGITOJ.

**Ĉeĥoslovakujo**  
Praha. — FD (Komerco): O. Sternschuss, Přemysl. nabr. 3, Praha XIV.

**Francujo.**  
Gamaches (Somme). — D: M. Duchochois, 2, Grande Rue.

**Hispanujo**  
Ba celona. — FD (Filatelio): A. Pameis Medina, Marina 179, 5-t, 1a.  
FD (Humora desegno): J. Ferrandiz Castells, Rda. St. Antoni, 27, 3-er, 1a.  
FD (Kemio): F. Miralles Ayala, Provenza 380, pral. 5a.  
FD (Komerco): F-ino C. Gisbert Garcia, Pl. Sagrada Familia, 13, 1-er, 1a.  
FD (Maraj aferoj): La Ĉefdelegito.  
FD (Studentaj aferoj): R. Gisbert Ferrandis, Av. 14 d'Abril, 338, 2-on, 2a.  
FD (Teatraj aferoj): J. Ferrandiz Castells, Rda. St. Antoni, 27, 3-er, 1a.

**Castellfersol.** — D: F-ino D. Ciuro Ribas, Pl. Dr. Fargas, 2.

**Sud-Afriko**  
Warmbad. — D: J. Semmelink, Box 88, Warmbad, Transvaal.

**Svisujo**  
Thun. — FD (Komerco): M. Schäfli, Waldheimstr. 28, Dürrenast, Thun.

**ŜANĜOJ.**

**Aŭstralio**  
Nova Ĉefdelegito: L. E. Pfahl, 64, Brighton Street, Croydon, N. S. W.

**Ĉeĥoslovakujo**  
Reichenberg. — FD (Komerco): vakas pro translokiĝo.

**Sud-Afriko**  
Johannesburg. — D: vakas pro translokiĝo.

**Svisujo**  
Bern. — FD (Komerco): vakas pro translokiĝo.



## MONATA STATISTIKO.

**Membraro.**  
Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Oktobro, kaj ankaŭ, por komparo, ĝis la fino de Oktobro, 1937:

	Oktobro 1938	Oktobro 1937
Asociaj Membroj	8450	9610

Individuaj Membroj:

	1938	1937
MJ	1370	1153
MA	1039	995
MAH	302	249
MS	132	133
Patronoj	11	13
DM	73	74
HM	30	31
<b>11407</b>	<b>2957</b>	<b>2648</b>

## Korespondajoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Oktobro, 1938:

Ricevitaj	488
Senditaj	3299
<b>3787</b>	

C. C. GOLDSMITH,  
Ĝenerala Sekretario.



N-ro 95. 10an de Novembro, 1938

### NOVAJ DELEGITOJ.

**Ĉinujo**  
Yunnanfu. — D: Chang Ching-Chiu, 27, Ta-Shin Street.

**Hispanujo**  
Moià. — D: R. Molera Pedrals, Catalunya 13, Moià, Barcelona.  
FD (Turismo): R. Oller Paserisa, Catalunya 22.

**Latvujo**  
Vecslabada. — D: F-ino E. Apinis, Vecslabada p. k. 17.

### ŜANĜOJ.

**Danujo**  
Esbjerg. — D: adresŝanĝo; Skjoldsgade 5 A 1th

**Jugoslavujo**  
Osijek. — D kaj FD muziko, metalurgio: adresŝanĝo; Tyrsova ul 3, Osijek 2.

### PATRONOJ.

Bonvolis aliĝi kiel Patronoj por 1939:  
1. W. E. Clayton, London, Anglujo.  
2. W. A. Gibson, Bathgate, Skotlando.  
3. T. J. Gueritte, Surbiton, Anglujo.

### MEMBRO-SUBTENANTOJ.

La jenaj gesamideanoj afable aliĝis kiel Subtenantoj por 1939:  
1. H. Davies, Manchester, Anglujo.  
2. M. Pearson, Sheffield, Anglujo.  
3. F-ino A. Fotherby, Surbiton, Anglujo.  
4. C. A. A. Haccou, Djokjakarta, Nederland-Indio.

Cecil C. GOLDSMITH,  
Ĝenerala Sekretario.



## Oficiala Informilo

N-ro 96. 17an de Novembro, 1938

### NOVAJ DELEGITOJ.

**Britujo**  
Long Eaton. — D: R. Anderson, 20, Mount Street, Breaston, Derbyshire.

**Ekvadoro**  
Quito. — D: J. Stadler, Casilla 854.

**Francujo**  
Enghien (S. et O.) — D: A. Germaine, 17, Rue Haussaire.

**Hungarujo**  
Gyöngyös. — VD: D-ro D. Grünfeld, Országút ucca 36.  
FD: (Kuracistaj aferoj): la VD.  
FD: (Filatelio): la VD.

**Tokaj.** — D: B. Fehér, Tokaj Allomás.



## Gestoj por deziri bonan nokton

S-ro *A. Lienhardt* (11, rue Pougin, Metz-Montigny, Francujo) sendis al ni la sekvantan artikolon el la sporta rubriko de la plej multe legata franca tag-jurnalo « Paris-Soir » de 23.10.1938, el la kompetenta plumo de la speciala sendito *Jean Eskenazi*.

### La ludistoj de l' kontinento unufoje kontaktiĝis dank' al la poliglotoj s-ro Pozzo kaj Raymond Braine.

La hotelo Carlton en Amsterdam estas la rendevuejo de la piedpilkistoj de l' kontinenta ekipo. La italoj Andreolo, Olivieri, Foni, Rava, Piola, Colaussi alvenis unuaj, sekvis la norvego Brustad, la belgo Braine, la franco Aston kaj la germanoj Kitzinger, Kupfer kaj Raftl. Mankis hieraŭ, el la « titoluloj », nur la hungaro Zsengeller, kaj la anstataŭuloj Hannemann kaj Schmauss.

Ĉi tiu kunveno de la ĉiunaciaj piedpilkaj eminentuloj ĝis nun kreskis per unu persono: s-ro Vittorio Pozzo kiu, kun multe da sukceso, anstataŭis la mortintan Hugo Meisl, en la arto esti poligloto. La « numero », kiun faras s-ro Pozzo, estas vere admiriga: hieraŭ vespere li kunvokis ĉiujn ludistojn por mallonga konferenco; li faris sian paroladon en la itala lingvo, poste — kiel en varieteo laŭ la stilo Spavaro aŭ Henry Bry — en la angla, germana, kaj franca.

La sola vera poligloto inter la ludistoj estas Braine kiu flue parolas france, flandre, angle, germane kaj ĉeĥe.

La afero tute ĉesas funkcii ĉe Zsengeller, kiu skrupule komprenas nenion

krom hungare. Tamen oni ne povas postuli de s-ro Pozzo ke li posedu ankaŭ la lingvon madjaran!

★

En la sama artikolo oni legas pli poste ke « kvankam kelkaj el la ludistoj havis ĉambron, ĉiu por si sola, la sekvantaj dormis kune: Olivieri-Raftl, Andreolo-Aston, Braine-Piola, Kupfer-Foni, Kitzinger-Rava », — do tre kamaradece oni laŭeble miksis la diversnaciajn; sed, demandas s-ro Eskenazi, « ĉu ili kapablis deziri al si bonan nokton? ». La sekvintan matenon Aston donas al li la respondo: « Oni (t.e. Aston mem) faris gestojn kun Andreolo por deziri bonan nokton, kaj tio funkciis bonege! »

Ho, la cinikulo!!!

★

## Kiel fluginstruisto en Ĉinujo

Pri la eksterordinaraj lingvaj malfacilaĵoj, kiujn eŭropano aŭ amerikano spertas, kiam li devas interilati kun « filoj de la Ĉielo », raportas *Cecil Lewis* en n-ro 170 de « Stadt-Anzeiger », Köln, Germanujo, 4.4.1938, kiu dum certa tempo estis fluginstruisto en Ĉinujo:

Ok lernantojn mi ricevis. Antaŭ ol preni ilin kun mi en la aeron, mi donis al ili kelkajn lecionojn surtere. Mi penis, klarigi al ili kelkajn « misteraĵojn », kiel: horizonto, oblikva pozicio, motorturnmomento, kaj tiel plu, — ĉion nature kun helpo de mia interpretisto. Tiaj okcidentaj fakterminoj kompreneble estis treege malfacile tradukeblaj, ĉar konformaj terminoj ĉinaj tute ne povis ekzisti.

(Parolante pri la ĉina lingvo, Cecil Lewis klarigas ke la dialekto de la Nor-

do, tio estas la lingvo de la oficistoj kaj kleruloj, havas kvar tonakcentojn. Ekzemple, la vorto « ka » povas signifi, laŭ la akcento: moskito, okulvitroj, tabakfumo, aŭ blua.)

Foje (rakontas Lewis), kiam mi havis ĉe la vespermanĝo kelkajn ĉinajn gastojn, mi volis brili per miaj ĉinlingvaj scioj kaj komisiis mian servoknabon, alporti seĝon: *Na idsa li!* Sed mi prononcis *idsa* kun malĝusta akcento, kaj la knabo revenis unu momenton pli poste kun — peco da sapo! — Krom tio la vortrezoro estas senlima. Imagu do, se oni devas diri ĉinlingve: « Vi devas puŝi la maldokstran flankdirektilon, por kontraŭagi la turnmomenton (turniĝemon)! Vi puŝas ĝin ne sufiĉe forte. Ĉu vi ne sentas ke la maŝino deglitas? Ĉu vi ne sentas la venton flanke de via vizaĝo? Tio estas signo ke ni devojiĝas. Puŝu la maldokstran flankdirektilon! Pli, pli! »

Mia piĝin-ĉina, ebliganta min, aĉeti pecon de sapo aŭ kelkajn kandelinojn, neniel sufiĉis por tia tasko. La sola ebleco estis, malfunkciigi la motoron kaj kriegi kelkajn vortojn parkere lernitajn: « Flankdirektilo! Pli flankdirektilo! Rekte-antaŭen! Rekte-antaŭen teni! » Sed, se la lernanto tion aŭdis, li ne povis ĝin konfirmi. Krome, pro la streĉa kriegado povis okazi, ke oni aplikis malĝustan akcenton kaj eble, senscie, ofendis la patrinon de la lernanto aŭ informiĝis pri liaj ŝuoj. Estis malagrabla situacio. La sola, kion oni povis fari, kiel ni baldaŭ spertis, estis — malsupreniĝi, klarigi al la interpretisto la malfacilaĵojn, atendi ĝis kiam li tradukis, kaj denove ekflugi. La sukceso estis aŭ nula, aŭ oni pelis la lernanton en la kontraŭan ekstremon: li tiom piedpuŝis la flankdirektilon, ke la maŝino turnegiĝis kiel katido sin turnanta malantaŭ sia propra vosto...

### Irlando

**Belfast.** — D: W. J. Williamson, 289/291, Castlereagh Road.

### Nederlando

**Hillegom.** — FD (Florbulboj): J. H. Spilker, Vesselaan.

### Svisujo

**Montmollin.** — FD (Sciencoj): Prof. W. Perrenoud, Montmollin (Neuch.).

**Solothurn.** — FD (Trafiko): La D.

★

### ŜANĜOJ.

#### Francujo

**Marvéjols.** — D: vakas pro translokiĝo.

**Paris.** — FD (Scienco): adres-ŝanĝo: 3, Av. du Général, Laperrine-Paris, 12. Tel. Dor. 68-53.


**Saint Denis.** — D: vakas pro translokiĝo.

★

### GAZETOJ.

Ni havas provizon da gazetoj ne plu bezonataj, kiuj estas tre utilaj por la propagando. Ni sendos po unu el ses diversaj landoj kontraŭ respondkuponon por la aŭfranko.

C. C. GOLDSMITH,  
Ĝenerala Sekretario.



Sendependaj aŭtomobil-posedantoj, imitu la ekzemplon de ĉi tiu belga samideano, kiu propagandis jam pli ol 10.000 kilometrojn por nia lingvo per la teksto: « Leert Esperanto, de internationale hulptaal! » (Lernu Esperanton, la internacian helplingvon!) — Niaj sudetgermanaj samideanoj propagandis ĝis la lasta momento. Ankoraŭ pendis la afiŝoj, varbantaj por la venontaj kursoj, kiam la germana armeo jam estis enmarŝinta. Apud la Esperanto-afiŝo sur la reklam-kolono oni vidas la proklamacion de la plenpova generalo.

## Esperanto - amasmovado !

### 1500 kunvenintoj postulas enkondukon de Esperanto en la Lernejoj

Ofte ni aŭdis la aserton : Esperanto finvenkos nur tiam, kiam ĝi fariĝos amasmovado, kiam la granda publiko postulos ĝian enkondukon.

La nederlanda oficejo « Esperanto ĉe la Instruado » en Amsterdamo decidis fari unuan gravan paŝon al tio. Ĝi luis por sabato, la 5-a de novembro, posttagmeze je la 3-a, la plej grandan salonon de la rezidenc-urbo Hago (den Haag, s-Gravenhage) por « Nacia Kongreso pri Esperanto ĉe la Instruado » (Nationaal Congres van Esperanto bij het Onderwijs) kaj, farinte kontrakton kun kvar eminentaj oratoroj, ĝi kun fido kaj espero rigardis renkonte al la okazaĵo ĝis nun unika en la Esperanto-movado.

La sukceso tutege pravigis la kuraĝon de la nomita oficejo : 1500 homoj aŭskultis la paroladojn kaj akceptis unu-anime la jenan rezolucion :

**La Nacia Kongreso por Esperanto ĉe la Instruado, okazinta la 5-an de novembro 1938 en Hago,**

aŭskultinte la paroladojn de reprezentantoj de gravaj religiaj kaj politikaj popolgrupoj, konstatinte la ĉiam kreskantan, kaj ankaŭ alilande sentatan bezonon je mondhelpingvo por la internacia trafiko,

konvinkite ke tio sen grandaj kostoj por la komuneco estos ebla, —

petas Registaron kaj Parlamenton:

1. akcepti Esperanton inter la fakultativajn (instru)fakojn, nomitajn en art. 2 de la Leĝo pri Elementa Instruado;

2. instruigi Esperanton en la institutoj por estontaj ĝeinstruistoj.

## Esperanto en la Libervola Civila Helpservo Internacia

La supre menciita societo organizis ankaŭ ĉijare diversajn helpservojn, i.a. por la Popola Altlernejo sur Herzberg apud Aarau (Svislando). Ĉi tiu Popola Altlernejo, kie kunvenas regule dum pluraj monatoj junuloj el plej diversaj rondoj de Svislando, gvidata de la konata pedagogo kaj verkisto Fritz Wartenweiler kaj tiom ŝatata de la svisa popolo, tre bezonis sportplacon, kaj la Libervola Helpservo deklaris sin preta fari tiun laboron kun eduka valoro.

En la beleĝa naturo de tiu regiono, je 700 m. de alteco, kunlaboris dum pluraj semajnoj homoj el diversaj nacioj por la konstruo de tiu sportplaco kaj tiel realigis utilan interpopolan helpon. Okazis samtempe kaj samloke « kudroservo » de la « fratinoj », dum kiu la virinaj anoj de LCHI kudris kaj trikis grandan kvanton da vestaĵoj por la hispanaj infanoj, kompatindaj viktimoj de la milito. Tiel ĉeestis sur Herzberg proks. 36 personoj el 9 landoj por helpi per sia sindona laboro al la in-terpopola helpo kaj servo.

Kompreneble en tiaj helpservoj estas ege sentataj la malhelpoj de la lingvo-diverseco, ĉefe dum la diskutoj kiuj estas organizataj dum la liberaj horoj. Tial kelkaj esperantistoj, membroj de LCHI, grupiĝis por propagandi Esperanton en la Helpservo kaj krei tiel vere supernacian atmosferon, kiam ni konas en niaj internaciaj esperantistaj kongresoj, kaj por pliintensigi la kontakton kaj interkomprenon inter la partoprenantoj. La gvidantoj de LCHI jam plurfoje esprimis sin favore al Esperanto, eldonante resumojn en Esperanto de raportoj pri helpservoj, aŭ tutesperantlingvan broŝuron pri la movado.

Ĉijare, profitante la favorajn cirkonstancojn,

juna nederlanda volontulo s-ano Niko F. de Graan, kiu jam kun granda sukceso gvidis kursojn en Flandrujo, donis kurson laŭ la Csehmetodo kaj sukcesis entuziasmigi la partoprenintojn por la lingvo kaj ideo. Tiun kurson partoprenis 12 personoj el 5 diversaj landoj: Svedujo, Danlando, Francujo, Hungarujo, kaj Svislando, do vere internacia kurso. Nur mallonge povis daŭri la kurso; dum du semajnoj oni lernis ĉiutage dum tri kvaronhoroj, sed oni disigis kun la firma deziro resti en kontakto kaj dank' al Esperanto pliperfekti la venontajn servojn.

Dum la venonta vintra sezono oni intencas starigi Esperanto-sekcion por propagandi Esperanton interne de LCHI kaj pristudi kaj prepari internacian Helpservon por la esperantistoj.

Ankoraŭ nesufiĉe konata en Esperantujo estas la ideo de Libervola Civila Helpservo Internacia, kiu tamen estas tiom parenca al la idealo de Zamenhof pri interpopola fratiĝo. Jam dum preskaŭ 20 jaroj okazas ĉiujare servoj en diversaj landoj; preskaŭ ĉiam ili konsistis en riparoj de damaĝoj post naturkatastrofoj. Entute okazis 23 servoj kun partoprenintoj el 35 landoj. Ni sincere esperas ke la esperantistaro helpos al la elkonstruo de tiu organizaĵo, por ke ankaŭ tie servu nia lingvo al la krea laboro de bonvolaj homoj.

Al la samideanoj, kiuj interesiĝas pri la faritaj laboroj de LCHI, kaj kiuj deziras pli detale koni ĝin, ni plezure sendos kontraŭ unu poŝtrespondkupono ilustritan esperantlingvan broŝuron. Skribu al: J. Gilliard, 3 Place du Marché, Annemasse (H-te Savoie), Francujo.

## Tutmonda Junular-Organizo

La redaktorino de « La Juna Vivo », la monata gazeto por la junularo, iniciatis pasintan jaron kunvenon por infanoj-esperantistoj kun bona sukceso. En aŭgusto de tiu ĉi jaro ŝi aranĝis similan kunvenon en Groet, Nederlando, en kiu partoprenis 200 infanoj el naŭ landoj. La kunveno sukcesis en tia grado, ke la konata Esperanto-pioniro Julius Glück nomis ĝin la tria grava okazo en la movado esperantista. La unua estis la apero de la lingvo, la dua, ke la homoj komprenis unu la alian en la unua Kongreso en Bulonjo apud Maro, kaj la tria estas, ke la infanoj en Groet, kunvenintaj sufiĉe grandnombro, kaj el naŭ diversaj landoj, ankaŭ bone komprenis unu la alian. Kaj ili ne nur povis kompreni sin, sed ili ankaŭ libere parolis kaj ŝercis. Ili havis tiom agrablan semajnon, ke oni decidis fondi Tutmondan Junular-Organizon, kies ĉefa tasko estas aranĝi ĉiujare Internacian Junularkunvenon kaj akceli la enkondukon de Esperanto en la lernejoj.

S-ro H. Schut, instruisto en Koedijk, Nord-Holando, faris filmon pri la kunveno, kiu estas valora propagandilo. Krom la belaj ĉirkaŭaĵoj de Groet oni vidas sur la filmo la infanaron dum ekskursoj, dancoj, teatraĵetoj, ktp. La prezentado daŭras 40 minutojn. Kopiojn de la filmo s-ro Schut jam forsendis al kelkaj landoj.

La nova organizo nomiĝas Tutmonda Junular-Organizo, ĝia organo estas «La Juna Vivo», sekretario estas la desegnisto Floor Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Nederlando.

En aŭgusto de la jaro 1939 la Ĝenerala Kunveno de T.J.O. okazos en la ĉirkaŭaĵoj de Brusel. Ĝi daŭros unu semajnon. Okazos dancoj, teatraĵetoj, ekskursoj, ktp. La partoprenontoj pagos entute sep guldenojn aŭ egalvaloron.

P. Kryt.

### Por eniri Franclando

Dekreto de 18.10.1938 (ŝanĝinta la dekreton de 14.5.1938) estas publikigita en la Oficiala Ĵurnalo la 19.10.1938.

La 2-a paragrafo de la 2-a artikolo de la Dekreto de 14.5.1938 estas jene ŝanĝita:

Por ricevi permeson eniri leĝe la francan teritorion, ĉiu ne-franco devas havi, laŭ la grupo, al kiu li apartenas pro sia nacieco, unu aŭ alian el la jenaj dokumentoj:

1-a grupo: Devas havi karton de identeco kun foto, aŭ nacian pasporton validan (aŭ nevalidan de malpli ol kvin jaroj): belgoj kaj luksemburganoj.

2-a grupo: Devas havi validan nacian pasporton, ankoraŭ validan, kiam ili eniras la francan teritorion, sed sen bezono de konsula vizo: la regnantoj de la jenaj landoj: Brazilo, Kubo, Danlando, Finnlando, Britujo (kaj ĉiuj anoj de la britaj terposedaĵoj transmaraj, kiuj havas la kvaliton de « British subjects »), Irlando, Nipono, Lihtenŝtejno, Meksiko, Norvegujo, Nederlando, Portugalujo, Siamo, Svedlando, Svislando, Urugvajio;

La svisaj regnantoj, tamen, escepte, kiam ili venas en Francujon por daŭro de malpli ol du monatoj, ne bezonas prezenti nacian pasporton, kaj ili estas nur devigitaj elmontri ĉu oficialan svisan permeson por konduki aŭtomobilon, ĉu pasporton nevalidan de malpli ol kvin jaroj, kiel la regnantoj indikitaj en la 1-a grupo.

3-a grupo: Devas havi validan nacian pasporton, kompletigitan per la vizo de franca konsulo, la regnantoj de ĉiuj landoj kiuj ne estas indikitaj en la du antaŭaj grupoj.

# Unueco estas Forto

## PROPAGANDU

ĉiam, ĉie, ĉiel  
kiam, kie kaj kiel eble !

## Esperanto en Radio

### Decembra programo de Parizo.

Ĉiulunde je 22.45 (ondo 431 m.); enondigo de Marc Darnault :

- 5.12. « Kantegrip » — aŭ « La porakcidenta industrio », radiofona komedio unuakta de Chr. Scheĝaebel, tradukis André Remond. Prezentos s-ro Remond.
- 12.12. « La birdoj » de Aristophanes, adaptita el la greka originalo de M.M. du Merton (unua parto). Prezentos s-ro Bastien.
- 19.12. « La birdoj » (dua parto). Prezentos s-ro Couteaux.
- 26.12. (en la manuskripto estis 25.12.; do estas rekomendinde, pri tiu ĉi elsendo konsulti sian nacilingvan programrevuon): « Kristnaska fabelo », radiofona montado de André Remond, laŭ Dickens. Prezentos f-ino Y. Paulier.

### Itala Radio eldonas monatan programkajeron en Esperanto.

Komencante de novembro nunjara, la itala ŝtata organizaĵo « Ente Italiano Audizioni Radiofoniche » (EIAR) eldonas monatan programkajeron, tute redaktitan en Esperanto, de la radiostacio de Prato Smeraldo en Romo, kiu ĉiutage dissendas paroladojn kaj koncertojn en diversaj naciaj lingvoj, kaj ankaŭ en Esperanto. La unua numero de la esperantlingva programkajero ampleksas 28 paĝojn.

### Zamenhof-memorigo el N.I.R. Bruselo.

Rigarde al la 79-a datreveno de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof ni povas jam nun fari ĝojigan komunikon, kiun niaj legantoj, precipe tiuj en la regionoj de la bona aŭdebleco de N. I. R., certe kun entuziasmo akceptos: Kunlabore kun la Esperantista Reprezentantaro Brusela (Leuvense Steenweg 649, Bruselo 3), elsendas la stacio N.I.R.-Vlaamsch (adr.: Eug. Flageyplaats, Bruselo), per ondo 321 m., la 14-an de decembro, je 19.00-19.30 GMT, Zamenhof-memorigon.


## Eldona Societo Esperanto 20-jara

En oktobro Förlagsföreningen Esperanto (Eldona Societo Esperanto) en Stockholm povis festi la jubileon de sia 20-jara ekzistado. La konata eldonejo fondiĝis la 6.10.1918 kaj estis estrata de la komenco ĝis nun de s-ro red. H. Halldor. Ĉiuj esperantistoj konas (aŭ devus koni!) la belajn volumojn kiujn eldonis E.S.E. en la daŭro de la jaroj, kaj kies plej elstaraj estas la fama libro pri André, « Gösta Berling », la « Sveda Antologio », « Hinda rigardas Svedlandon » kaj « La homaj rasoj ». Entute E.S.E. eldonis ĝis nun 73 diversajn librojn kaj broŝurojn en sume preskaŭ 250.000 ekzempleroj. Krome estas speciale menciinda la landa organo « Svenska Esperanto-Tidningen », unu el la plej bone redaktitaj kaj plej bele eldonitaj gazetoj esperantistaj, kiun la E.S.E. en efika maniero apogas. Al E.S.E. okaze de ĝia jubileo nian tutkoran gratulon kaj bondeziron!

## Ni funebras

— D-ro PAŬLO STANIŠIČ, advokato en Zemun (Jugoslavio), mortis 60-jara la 12.9.1938. Malnova esperantisto, kunlaborinto de pluraj gazetoj, adepto de la Gesell'a movado « Liberekonomio », pri kiu li aperigis plurajn verkojn nacilingvaj kaj esperantaj. Li ripozu pace!

— S-ro JOHN JOSIAH BOUTWOOD mortis en Hastings (Anglujo), post longa malsano, la 22.10.1938. Li estis 77-jara. S-ro Boutwood multe laboris por nia movado dum longa tempo. Li estis Patrono kaj Delegito de IEL, Vicprezidanto de la Brita Esperantista Asocio, kaj estis ĉiam unu el la plej fervoraj subtenantoj de la movado en Britujo. Li ĉeestis multajn internaciajn kongresojn kaj havis grandan aron da amikoj en preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo.



Nia hodiaŭa filmo prezentas: 1. Interesa ekspozicieto de antikvaĵoj (« garnitaj » per Esperantaĵoj), parte propramane elfositaj de nia samideano Carl Franzmann (dekstre), posedanto de Esperanto-hotelo en Groesbeek (Nederland). La samideanino (maldekstre) estas f-ino Wenneckes el Utrecht. — 2. Japana samideano Sadaĵiro Kubo vizitis kun frato kaj bofrato la Esperanto-klubon de San Francisco (Usono). Nia bildeto montras la japanajn gastojn kun usonaj gesamideanoj en la ĝardeno de la hejmo de ges-roj Vinzent. — 3. Kurso de studentoj en Dupnica (Bulgarujo). Jam pli frue ni sciigis ke nia movado nuntempe bone progresas en la « lando de la rozoj ». — 4. Rememoraĵo pri kara samideanino: f-ino M. Saxl † inter siaj kolegoj-instruistoj en la unua nunjara kurso en kolegoj en la unua nunjara kurso en Helsingör. — 5. Alia rememoraĵo: 16 gesamideanoj-kongresanoj de la 30-a U.K., kiuj partoprenis jam la 3-an U.K. en Cambridge 1907.

## La belaj naciaj kostumoj

Unu el la atrakcioj de l' esperantistaj kongresoj estas la belaj naciaj kostumoj: bulgaraj, ĉeĥoslovakaj, estonaj, hungaraj, nederlandaj, polaj, svedaj ktp. Foje ili estas simple ĉarmaj, foje pompe grandiozaj. Inter la plej belaj troviĝas la ĉeĥoslovakaj, kiuj ĉiujare dum niaj universalaj kaj aliaj kongresoj altiras la atenton kaj admiron de l' kongresanoj kaj de la loĝantaro de l' kongresurboj. Nia apuda bildo montras kelkajn ĉeĥoslovakajn gesamideanojn en naciaj kostumoj, elvenantajn el la preĝejo post esperantlingva prediko dum la 20-a (Jubilea) Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) en Ljubljana, ĉefurbo de Slovenio (Jugoslavio).





# Propaganda parolado

farita de E. Malmgren dum la 30-a Univ. Kongreso en Londono.

## II.

### Raporto pri farita laboro de la Propaganda fako de IEL.

Ĝenerale mi konstatas, ke la landaj asocioj ŝajnas esti kontentaj pri tio, ke ili nun havas internacian kontakton. Ili nun povas ricevi de la internacia organizaĵo ne nur admonon pri pago de kotizo (ankaŭ tio estas grava!), sed ili povas ricevi diversajn laborproponojn. Kelkfoje la landaj asocioj ŝatas kaj aplikas tiun kaj tiun proponon, kaj kelkfoje ne. En ĉiu okazo ili nun vidas, ke la centra organizaĵo vivas, kaj tio en si mem estas instigo al laboro.

En pluraj cirkuleroj la Propaganda fako do provis detale informi la landajn asociojn pri diversaj labormetodoj kaj labormanieroj:

a) Ni ekz. atentigis pri la graveco fondi **turisman servon** pere de Esperanto. Rezulto estis, ke Norvegujo kaj Ĉeĥoslovakujo aranĝis laŭ nia propono. Jam antaŭe ekzistis tia turisma servo en Anglujo, Francujo, Svedujo kaj Estonio.

b) IEL atentigis pri **instruistaj kursoj aŭ instrukci-kursoj** dum la someroj. Momente mi povas konstati, ke tiaj kursoj jam estas aranĝitaj en Svedlando, Danujo, Nederlando, Litovujo, Estonio kaj Francujo. La norvegoj intencas aranĝi por la venonta jaro.

c) IEL iniciatis **intersanĝon internacie de mallongaj teatraĵoj** por vigligi la kluban vivon. Ni kolektis kaj distribuis kelkajn tiajn teatraĵojn. Tio trovis ĝeneralan aprobon inter la landaj asocioj. Ankaŭ multaj izolitaj esperantistoj korespondis kun ni pri tiu afero. Speciale mi volas citi s-ron Kalma el Nederlando, kiu donis tre bonajn konsilojn tiurilate. IEL ricevis gravan helpon por la pretigo de mallongaj teatraĵoj flanke de Norvegujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo kaj Svedlando. Ni atendas mallongajn teatraĵojn ankaŭ el aliaj landoj.

d) IEL proponis pretigon de **ekspozicioj por la propagando** en la diversaj kluboj kaj urboj. Laŭ nia iniciato la norvega asocio agis.

e) La norvega asocio ankaŭ starigis t. n. "**Pasivan membrecon**" por havigo de mono al la asocio. Laŭ nia detalpropono.

f) Por sekurigi la ekonomion de la landaj asocioj ni proponis **starigon de Propagandaj fondaĵoj**. Ni ankaŭ eĉ pretigis modelstatuton por tiaj fondaĵoj. La jugoslava asocio realigis la proponon, kaj ankaŭ aliaj landaj asocioj montris sian intereson por la ideo.

g) Same ni rekomendis al la landaj asocioj aranĝi **monkolekton laŭ certa sistemo** por havigi monon. Multaj landaj asocioj esprimis sian dankon pro la donita sugesto.

h) Por helpi la asociojn krei bonan kontakton inter si kaj la aliĝintaj kluboj, ni proponis **raportan sistemon** kaj dissendis modelan blankedon por tio. Efektivigis en Svedlando, Norvegujo kaj Ĉeĥoslovakujo.

i) Nian proponon por **esperantigi hotelojn** trovis bonvolan akcepton speciale en Francujo kaj Norvegujo.

j) Ĉar la **korespondaj kurso** en kelkaj landoj havis grandan sukceson, IEL pretigis kompletan komencan kurson kaj rekomendis al ĉiuj landaj asocioj eldoni ion similan. Momente ekzistas tiaj korespondaj kursoj en Svedujo, Anglujo, Norvegujo, Danujo kaj Belgujo. Kaj la norvega asocio decidis novredakti sian malnovan kurson.

k) Por koncentrigi la Esperanto-propagandon al certa semajno, ni proponis aranĝi "**Esperanto-semajnon**" en la komenco de la studsezono, do en la fino de septembro aŭ komenco de oktobro. Tio efektivigis en Jugoslavujo kaj Norvegujo. Jam antaŭe oni praktikis la saman sistemon, ekz. en Francujo kaj Svedlando.

l) IEL proponis pretigon de **turist-prelegoj**. La svedoj kaj nederlandanoj jam pretigis tiajn. Kaj la ĉeĥaj kaj norvegaj samideanoj ĝuste nun estas el-laborantaj.

m) Grandan, tre seriozan atenton IEL dediĉis al la **gazetara informoservo**. Jam dum la Varsovia Kongreso mi sufiĉe detale klarigis kaj admonis starigon de gazetara servo. Poste ni eĉ pli detale al la landaj asocioj skizis la organizan demandon por havi plenan sukceson. Ŝajnas, ke momente la gazetara servo bone funkcias en Norvegujo, Ĉeĥoslovakujo, Svedlando, Nederlando kaj Francujo.

n) IEL ankaŭ en siaj cirkuleroj tuŝis aliajn pli malpli gravajn aferojn kaj faris diversajn admonojn kaj sugestojn. Tamen mi nun traktis la ĉefajn.

Kaj nun venas kelkaj novaj proponoj

## III.

### Esperanto-oficejoj.

Kiam mi prezentis diversajn proponojn al la landaj asocioj, okazis tre ofte, aŭ tro ofte, ke mi ne ricevis respondon de multaj el ili. Kaj kelkfoje mi estis tute senespera, ĉar plene mankis la kontakto kun sufiĉe multaj landaj asocioj.

Kaj mi sentis mian laboron tute senespera.

Sed rigardu, samtempe mi provas mianflanke kompreni la estraranojn de la landaj asocioj. Mi scias, ke ili havas sian ordinaran ĉiutagan laboron. Mi scias, ke ili devas zorgi por la ĉiutaga vivpano, por sia familio kaj por sia propra spirita bonfarto. Mi do komprenas, ke la tempo estas mallonga por korespondado internacia. Ĉar la estraranoj kompreneble antaŭ ĉio volas zorgi pri la kontakto kun la enlandaj esperantistoj kaj kluboj.

Do, samtempe kiam mi plendas, mi trovas klarigon por la nerrespondemo.

Verŝajne ni kune ne povos solvi tiun ĉi problemon, antaŭ ol ni en ĉiuj landoj povos starigi bonajn Esperanto-oficejojn. Kaj ni devas esti pretaj pagi la oficistojn parte aŭ tute por ilia laboro. Aŭ almenaŭ repagi la elspezojn por tramvojaĝoj ktp. Mi petas, ne kontraŭdiri min en tiu punkto, ke oni pagu honorarion al Esperanto-laborantoj. Ni ja scias, ke Esperanto estas idealista afero. Sed se ni rimarkas, ke la farita laboro ĝenerale ne estas kontentiga, tiam ni devas ŝanĝi. Tial jam faris preskaŭ ĉiuj aliaj idealistaj organizaĵoj, ekz. Ruĝa Kruco, Savarmeo, Pacifistaj societoj, Skolta movado, Kristana junularo ktp.

**Kiel starigi oficejon?** Kelkaj landaj asocioj jam de longe havas specialan oficejon, ekz. la angla kaj franca. Ni ĉiuj scias, ke ĝuste tiuj asocioj tiel modele laboras en siaj koncernaj teritorioj.

Nu, por havigi al sia landa asocio oficejon, oni devas havi la necesan monsumon por la luado. Kiel akiri tiun monon, jen la problemo! Se oni havas inter la membroj kelkajn riĉajn personojn, oni ja povas inter ili kolekti la necesan monon. Sed se oni ne havas tiajn valorajn subtenantojn, oni devas serĉi alian vojon.

Ĉu mi nun rakontu, kiel la sveda federacio en modesta maniero akiris sian oficejon!

Jun belan tagon en Januaro 1933 mi estis en akompano de deko da junuloj esperantistaj. Ni ĵus vizitis agrablan Esperanto-kunvenon, kaj la bonhumoro estis inter ni. En tiu agrabla atmosfero mi kaptis la okazon kaj diris: Amikoj, vi rimarkas, kiel evoluis nia movado, kaj vi komprenas, kiaj perspektivoj! Sed ĉu vi pripensis, ke ni tamen ankoraŭ ne posedas propran oficejon de nia sveda federacio! — Ĉiuj kris: Ho, ni devos havi nian propran oficejon! — Kaj mi diris: Jen, estas vi, kiu povos havigi ĝin! Sed kiel? Nu, ni estas tie ĉi dek-ses. Se vi konsentas kontribui je po 1 krono monate por luo de oficejo, ni certe povos persvadi ankoraŭ 20 aliajn esperantistojn en la ĉefurbo kaj kelkajn en la cetera parto de nia lando. Tiamaniere la lupago jam estos pagita. — Ĉiuj jun-

uloj entuziasme konsentis fari sian devon.

Kaj tiel, sen ia elspezo por la landa federacio, ni jam la 1-an de aprilo 1933 luis oficejon por la sveda movado.

La entuziasmo de kelkaj junuloj forigis la barojn, kaj kvankam la junuloj estis malriĉaj, ili tamen volonte pagis sian sufiĉe altan kotizon. Kaj dum kelkaj jaroj ni daŭrigis laŭ la sama maniero. Nur poste, kiam la sveda federacio farigis pli forta, la federacia estraro decidis transpreni la plenan lupagon. Sed nia turista entrepreno, ETK, konstante pagas sian parton de la lukosto.

Nun kelkaj konkludoj: Mi scias, ke nur tre malmultaj landaj asocioj havas monon lue propran ejon. Mi konsilas, ke vi havigu monon laŭ la sama maniero, kiun mi nun skizis. Sed mi nepre konsilas, ke vi provu kunfandi la oficejon de via landa asocio kun tiu de via Esperanto-eldonejo aŭ de via librovenda asocio. Ĉar finfine la landa asocio devas vivi pere de malaltaj kotizoj, sed la libro-vendado povas alporti konsiderindan gajnon. Mi opinias, ke parto de tiu gajno nepre estu uzata kiel helpo al la landa asocio. Ĉar fakte la librovendado estas plej intime dependa de forta landa organizaĵo, kiu povas bone organizi la Esperanto-propagandon. — Do, ĉiam provu lue komunan oficejon por la landa asocio, la librovenda fako kaj ankaŭ por la turista fako, se tia ekzistas.

Kaj mi ripetas: Ni ne povos atendi

kontentigan laboron en niaj Esperanto-organizaĵoj, antaŭ ol ni havos proprajn Esperanto-oficejojn. Samideanoj, vi pripensu la aferon! Devizo estu: Esperanto-oficejo en ĉiu lando !

IV.

**Gazetara Esperanto-Kurso.**

Mi ankaŭ volas tuŝi alian propagandan manieron. Nur tuŝi !

En la pasinta jaro mi propagandis por Koresponda Kurso. En Svedlando ni ankaŭ pretigis kurson por la gazetaro. La kurso konsistas el 16 lecionoj. Por ke la gazetoj ne bezonu komposti la kurson, ni pretigis matricojn, unu matrico por ĉiu leciono. La matricoj kostis al ni iom da mono, sed ne tre.

Kaj jen kiel okazis : Ni havas en nia lando energian esperantiston, kiu estas komerca agento kaj travojaĝas la landon. Li transprenis la propagandon de la gazetara kurso. Kaj li iris al la redaktoroj de la gazetoj. Vi scias, kion povas fari redaktoro, kiam alvenas sperta komerca agento ! Speciale, kiam tiu agento postulas pagon de 150-200 kr. por la permeso al la gazeto aperigi la kurson. Kaj speciale kiam tiu agento afable proponas, ke la pago por la kurso povas okazi pere de anoncado, de Esperanto-anoncoj !

En la pasinta jaro nia agento, lia nomo estas s-ro Fejde, sukcesis persvadi

30 gazetojn aperigi la kurson. Kaj en tiu ĉi jaro li nun preskaŭ atingis la ciferon 100. En la nuna momento la sveda asocio havas la rajton aperigi anoncojn en la gazetaro je sumo de 2.000 kronoj, kaj tiun sumon ni posedas kiel anoncan kapitalon. Rigardu : por 2.000 kronoj senpagaj anoncoj !

Mi intencas en la aŭtuno al la landaj asocioj fari proponon agi laŭ la sama maniero.

Kaj nun mi kaptas la okazon fari al vi demandon : Ĉu iu el vi estas bona karikaturo-desegnisto aŭ ĉu vi konas iun lertan desegniston, kiu volus nin helpi fari gajan serion da desegnaĵoj por la Esperanto-propagando en la gazetoj ? Ni intencas nome, se eble, en la gazetoj anonci pere de tiaj amuzaj desegnaĵoj. Ili similu ekz. al la Adamson-bildoj.

Mi certe ne bezonas akcenti, ke tia gazetara kurso estas grava el multaj vidpunktoj. Unue oni lasas la ĝeneralan publikon informiĝi pri Esperanto. Due oni katenas la koncernan gazeton, kiu almenaŭ dum la aperigo de la kurso absolute ne povas kontraŭbatali Esperanton. Sed nature tia kurso ne multe signifas por esperantistigi homojn. Tamen estas bona reklam-maniero.

Cetere ni nun intencas iom post iom aperigi post tiu kurso en la koncernaj gazetoj felietonon en Esperanto. S-ro Baghy jam promesis sian helpon. Kaj la felietono aperus ekz. lunde en Esperanto kaj la sama parto marde en la sveda lingvo. Tial, ĉar la felietono estas streĉa kaj interesa, ĉiuj homoj penados legi la tekston jam lunde, kaj tial devos ekzerci Esperanton !

V.


**La Gazetara Servo.**

Kiam ni raportis pri proponoj jam faritaj de IEL al la landaj asocioj, mi diris al vi, ke ni speciale atentigis la landajn asociojn pri la graveco starigi laborkapablan kaj racian gazetaran servon. Bedaŭrinde la plej multaj estraroj de la landaj asocioj ŝajne ne havis intereson por tiu afero kaj tial ne agis laŭ nia propono.

La ideo nome estis, ke ĉiu landa asocio elektu specialan homon aŭ specialan komitaton por prizorgi la gazetaran servon en la koncerna lando. Poste mi intencis proponi starigon de internacia centro por la distribuado de Esperantovovaĵoj.

Kvankam do la rezulto de unua paŝo sur la gazetara vojo ne estis longa, mi tamen nun kuraĝas proponi duan paŝon. Povas esti, ke tiu dua instigo vigligos pli multajn.

Vi sciu, ke en ĉiuj malgrandaj kaj mezgrandaj landoj oni tre atente rigardas, kion oni faras en Anglujo kaj Francujo. Kaj krom tio : Informojn oni sufiĉe facile povas publikigi en la plej



Ernfrid Malmgren : « Ĝis nun ni havis la intencan tuj esperantistigi la tutan mondon. Per tio ni malatentis la unuopajn simplajn personojn. La nova sistemo diras: Varbu 1 (unu!) novan esperantiston! — La cifero 1 estas preskaŭ la cifero 0, sed per multaj 0-oj ni povas atingi 100 aŭ 1000 aŭ 100.000, se troviĝas antaŭ la 0-oj nur la malgranda cifero 1! » (« La Varbgarantia Ĉeko » — « Esperanto Internacia », Novembro 1938.)

Sed nepre ne lasu nian Vic-Prezidanton klopedi tutsola!

multaj eŭropaj gazetoj, se temas pri io interesa el Anglujo aŭ Francujo. Tial estas ankaŭ facile aperigi artikolojn pri Esperanto, se tiuj novaĵoj venas el la nomitaj landoj.

Eble la angloj kaj francoj nun diras: Malofte okazas io priskribinda ĉe ni. Vi malpravas! Preskaŭ ĉiusemajne aŭ almenaŭ ĉiumonate io okazas. Mi diros kelkajn ekzemplojn: La angla Esperanto-asocio povas dissendi artikolojn kaj scigojn pri:

- 1) Nia nuna kongreso + bildkarto.
- 2) La honoraj membroj de la kongreso.
- 3) Intervjuo de konatoj angloj (do multaj artikoloj!).
- 4) La speciala Esperanto-aŭto en la propagando.
- 5) La fondaĵoj por krei propran domon.
- 6) La Esperanto-literaturo en Anglujo (la detektiva eldonado).
- 7) Detalraporto pri Esperanto-instruado en diversaj lernejoj (pluraj artikoloj).
- 8) Artikoloj pri la Esperanto-kursoj en diversaj firmoj.
- 9) Esperantlingvaj turistbroŝuroj pri anglaj lokoj.
- 10) Intervjuo kun nia ĝenerala sekretario.

Por Francujo oni povas uzi preskaŭ la samajn temojn.

Mi atentigas je tio, ke ne sufiĉas aperigi ordinaran artikolon en la esperantaj gazetoj, ĉar ofte oni ne rekte povas uzi la artikolojn por la ĝenerala gazetaro. Ne, la artikoloj devas esti speciale skribitaj por la ĝenerala publiko.

Post nia nuna kongreso (t. e. la Londono) mi intencas skribi detalan proponon pri tiu ĉi afero al la angla kaj franca asocioj. Mi petos, ke ili elektu iun homon, kiu sin speciale dediĉos al la afero kaj prizorgos artikolojn pri la enlanda Esperanto-movado. Mi ankaŭ petos, ke oni sendu al mi tiujn artikolojn, kiujn mi distribuos al ĉiuj landaj asocioj, kiujn mi distros al ĉiuj landaj peradi la publikon en la gazetaro de la propra lando.

Mi asertas, ke tiaj artikoloj povos signifigi plej efikan subtenon al nia movado. Kaj la propagando por Esperanto-kursoj ricevos gravan apogon kaj helpon.

★

Jen, amikoj, kelkaj proponoj! Kaj mi finas — substrekante la gravecon pri kunlaboro. Se ni subtenos unu la alian kaj se ni diligente laboros en niaj diversaj laborkampoj — tiam la venko estos nia!

**UNUECO ESTAS FORTO**

tial:

**Varbu por I.E.L.**



**La Majstro ricevis la 1000an numeron de « Heroldo de Esperanto ».**  
**El la ĉielo li telefone gratulas la redaktoron:**

**Cent Heroldoj alvenis, mil Heroldoj alvenis;**  
**Vi heroldu kaj heroldu konstante!**

## Esperanto — "nedezirata" (?)

Mil lingvoj kaj pli — nenombrebla legi' —  
 Homaron hantadas\*) monstrole,  
 Kaj ĉiu naci' kun jaluzo, pasi'  
 Defendas la sian skrupule.  
 Sed troa la ben' jam fariĝis ĉagren',  
 Kaj se vi eĉ kredus naive,  
 Per studa la pen' ke ebligus kompren':  
 Vi ja ne ellernos dumvive.

Sed tamen, kaj male al ĉia raci',  
 (Ĝi sonas egale al ironi')  
 Diris voĉo aŭtoritata:  
 Esperanto — « nedezirata »!

Kun viz' kaj valiz' ĉe la bord' de Tamiz'  
 Matene se domon vi lasas,  
 Tagmeza surpriz': jen sub vi jam Pariz'!  
 Vespere vi Romon trapasas.  
 Afrik', Amerik', vasta eĉ Pacifik':  
 Hodiaŭ distanc' liliputa.  
 Nur estas tragik': en ĉi tiu trafik'  
 La hom' pli kaj pli restas muta.

Sed tamen, kaj male al ĉia raci',  
 (Ĝi sonas egale al ironi')  
 Diris voĉo aŭtoritata:  
 Esperanto — « nedezirata »!

Ho glora invent' de l' dudeka jarcent',  
 Trezor' ŝategata: Radio!  
 Kun temperament', elokvento-torent'  
 Aŭdiĝas multiu genio.  
 Sed, sankta Ezok'!, tuj atakas vin ŝok' —  
 Vi lingvan Babelon malbenas;  
 Ĝi estas la mok' de l' moderna epok':  
 Vi aŭdas ja, sed ne komprenas!

Sed tamen, kaj male al ĉia raci',  
 (Ĝi sonas egale al ironi')  
 Diris voĉo aŭtoritata:  
 Esperanto — « nedezirata »!

Min logis la kri' pri plej nova filmstri'  
 El Hollywood ĵus importita.  
 La Anglan mi tri jarojn studis, eĉ pli,  
 Sed restis pro ĝi senprofita.  
 Sonfilma la ĝu' ŝanĝas sin je enu',  
 Se oni komprenas nur ere;  
 La bela revu' — jam sensenca nur bru' —  
 Publikon ĉagrenas envere.

Sed tamen, kaj male al ĉia raci',  
 (Ĝi sonas egale al ironi')  
 Diris voĉo aŭtoritata:  
 Esperanto — « nedezirata »!

En ĉarma Munĥen' ĵus okazis kunven'  
 Por solvi problemon ciklopan:  
 Ja plena de pen' estis la entrepren':  
 Ripari la pacon eŭropan.  
 Des pli pena, ĉar la « Kunvenon de l' Kvar »  
 La lingva Babelo tre ĝenis.  
 La mondgazetar' ĝin elmontris kun klar':  
 La « Kvar » ne sin rekte komprenis.  
 Sed tamen, kaj male al ĉia raci',  
 (Ĝi sonas egale al ironi')  
 Diris voĉo aŭtoritata:  
 Esperanto — « nedezirata »!

Kun granda aŭdac' oni « cele de pac' »  
 Aranĝas mondskalajn mitingojn,  
 Per gesto kaj ŝmac' kaj per muta grimac'  
 Festenas « kulturajn atingojn ».  
 Kun kia sukces'? Miskomprenoj sen ĉes'! —  
 Sed kiam « verduloj » kunvenas,  
 Jen vera progres': ili kun interes'  
 Sin rekte, perfekte komprenas.

Kaj venos epoko, kaj venkos raci',  
 Silentos jam moko kaj ironi',  
 Diros voĉo aŭtoritata:  
 Esperanto — deziregata!!!

\*) Hanti (angle « haunt », france « hanter »): ago de fantomo aŭ netereca estaĵo, kiu vizitadas aŭ enloĝas difinitan lokon, kelkfoje sin malkaŝante al homoj laŭ timiga maniero.



# La Esperanto-Literaturo kreskas

**K. Kalocsay kaj G. Waringhien : Plena Gramatiko de Esperanto**, kun detala komentario pri vorto kaj frazo. Dua tralaborita eldono. 490 p. 20 x 13,5 cm. Broŝurita. Prezo (inkl. send-kostoj) 2.86 dolaroj. Eldonis: Lit. Mondo, Budapest.

Oni ne devas konsideri ĉi tiun gramatikon lernolibro, per kies 414 paragrafoj kaj miloj da subparagrafoj, rimarkoj kaj notoj oni devus plenŝtopi la memoron. Al mi pli vere ĝi ŝajnas provo, esplori nian lingvon en ĉiuj ĝiaj gramatikaj detaloj, kaj la tutan materialon ordigi en certan sistemon. Ĉu tiu provo sukcesis? Ignorante kelkajn neperfektaĵojn, kiuj ne mankas en kia ajn homa laboro, oni devas konfesi ke la aŭtoroj eĉ bone sukcesis. La dua eldono de la Plena Gramatiko efektive prezentas la maturan frukton de tre diligenta laboro kaj kunlaborado multjara. Oni povas diskuti pri detaloj, kaj certe ankaŭ la dua eldono ankoraŭ ne en ĉiuj siaj paragrafoj estas definitiva; sed tio ne malhelpas ke la Plena Gramatiko en sia nuna formo estas bonega konsilanto — ne deviganto! — en preskaŭ ĉiuj dubaj okazoj.

El la kelkaj aferoj ankoraŭ ne sufiĉe klaraj mi mencias nur unu: la « problemon » ata-ita. Kaj oni devas ja miri, kial la cetere tiel objektivaj aŭtoroj en ĉi tiu punkto defendas nur sian propran (laŭ mia konvinkigo nepre misan) vidpunkton, sed tute ne klopodas prezenti ankaŭ la por tia lingvo, kia estas Esperanto, solan pravigeblan uzadon, kiun sekvas minimume la duono de esperantistaro, ankaŭ « Heroldo de Esperanto », ankaŭ la Internacia Cseh-Instituto, kaj kiun rekomendas la nuna Prezidanto de la Esperantista Akademio kaj — la simpla, klara kaj neperfortita logiko.

« Multaj kredas », skribas la aŭtoroj de la Plena Gramatiko, « ke en okazo de samtempo oni devas apliki la tempodistingilon nur unufoje. Do, ekz-e, se la frazon; **la ŝlosilo estas perdita** oni volas esprimi en estinta tempo, oni devas diri: **la ŝlosilo estis perdata**, ĉar la pasinteco jam esprimas **estis**, do estas pleonasmio ĝin esprimi ankaŭ per la participo. » Ne! **Neniu** tion kredas aŭ asertas. Se la frazon: **la ŝlosilo estAs perdata** oni volas esprimi en estinta tempo, oni **sendube** devas diri: **la ŝlosilo estls perdata**. Sed se la frazon: **la ŝlosilo estAS perdata** oni volas esprimi en estinta tempo, oni **same sendube** devas diri: **la ŝlosilo estls perdata**, kaj estas ĝuste tie, kie la ita-emeĝuloj konsekvence eraruzas **perdata!** Estantatempe A l estas estintatempe l l, tute logike kaj klare (ĉi tie la aŭtoroj de la Pl. Gr. nepre pravos), sed same logike kaj klare devas estantatempe A A estintatempe esti l A, kaj ne l l; alie oni ja povus samprave aserti ke estantatempe A A devas estontatempe esti O O, kaj tion eĉ D-ro Kalocsay kaj Prof. Waringhien per ĉiuj siaj kompetentecoj rifuzos. La **daŭron** kaj **ripetadon** oni esprimas en Esperanto en la sufiks(oid)o **-ad-** (ripetadon ankaŭ per **re-**), sed ne per **-at-**; per **-at-** oni esprimas la **samtempecon**, sed samtempeco kaj daŭro ne estas ĉiam la sama, ĉar samtempeco povas daŭri tutan jarcenton, aŭ nur centonon de sekundo.

Entute per la konjugacio oni **ne** esprimas la **daŭron**; se en la aktivaj formoj **estas (-is, -os)** anta tiel **ŝajnas**, tio devenas de la fakto ke en la aktivo ni disponas pri la simplaj formoj **-as, -is, -os**, krom la malsimplaj; do konfuzo ne povas okazi, kaj ankaŭ ne okazas renverso de la tempofaza signifo. Sed en la pasivo la korespondaj simplaj formoj mankas kaj, por eviti anarkion en la tempofaza signifo de la participoj, ni bezonas do konservi la pure konjugacian

karakteron de la pasivaj participoj kaj devas ne intermiksi ilian signifon kun tiu de afikso (-ad-, re- aŭ ek-).

Kapskuon kaŭzas la jena aserto: « La pluskvamperfekto en Esperanto propre estus: **estas estinta -ata** (daŭro-verboj) kaj **estas estinta -ita** (rezult-verboj.) » Mi ne komprenas, kial la aŭtoroj, cetere tiel klarmensaj kaj objektivaj, prenas sian rifuĝon al tia komplikegaĵo por la provo pravigi la misan koncepton pri tiu punkto de la gramatiko.

Estas neeble, en la kadro de recenzo elĉerpe pritrakti tian libregon. Por tio oni bezonus tutan jarkolekton de ĉi tiu gazeto, kaj eĉ tiam la loko ne sufiĉus. Praktike la Plena Gramatiko ja entenas (esceptinte nur la vortaron) la tutan materialon de nia lingvo, kaj pri tiu materialo oni povus skribi kaj diskuti senfine. En la mano de vera esperantisto ĝi povas fariĝi riĉa trezoro, fonto neniam sekiĝonta, leksikono ĉiam denove volonte konsultota, amiko kun kiu oni volonte diskutos kvankam por la lingvosperta Zamenhofano ne ĉio, kion la libro prezentas, nepre estos « tabu ».

La aranĝo de la libro en sia nuna formo estas tre klara, supervidebla, la preso bona, la klarigoj estas tiel formulitaj, ke samideano iom sperta en la lingvo, kaj ankaŭ ne tute senscia pri gramatikaj aferoj ĝenerale, povas bone kompreni ilin; des pli, ĉar ĉie tra la libro abundas ekzemploj, grandparte ĉerpitaj el verkoj de la majstro. Por komencantoj la libro ne estas destinita; ilin ĝi nur konfuzos. Sed kiu jam trapasis la komencperiodon de sia esperantistigo, al tiu la Plena Gramatiko povas doni utilajn konsilojn kaj direktivojn en kazoj de dubo.

Malgraŭ la amplekso de la libro, eldonita sub tia titolo, amplekso kiu povas ŝajnigi nian lingvon same malfacila kiel la naciaj lingvoj, Esperanto restas facila. Estas tamen necese, ripete averti ke oni, per eble tro detalaj precizigoj en kelkaj rilatoj, ne faru ĝin nemanipulebla por simplaj homoj. Kaj estas konsilinde, en kelkaj aliaj rilatoj, eĉ plisimpligi ĝin, almenaŭ ĉie kie tio pro diversaj konsideroj estas ebla. Ni rajtas tion fari, ĉar Esperanto estas artefarita lingvo. Eĉ en naciaj lingvoj oni kelkfoje permesas al si iujn simpligojn.

Finante, mi deziras al la Plena Gramatiko grandan disvastiĝon. Precipe ĉiu grupbiblioteko ekposedu ĝin!

T. J.

**Gösta Henriksson: Per motorciklo en tri landoj.** Ilustris Rud. Demuth. — 38 p. 13 x 19,5 cm. Prezo sved. kr. 0.75, ekskl. afr. Eldonis Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm. Mendebila por guld. 0.45, inkl. afranko, ĉe: Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.

Simpla, sincera priskribo taglibra de vojaĝo, kiu kondukis kvar gesamideanojn svedajn per du motorcikloj de Malmö tra Danlando kaj Germanujo al esperantistaj amikoj en Ĉeĥoslovakio, kaj returne. La lingvo estas korekta, la stilo facila. Tial la verketo bone taŭgas kiel legolibreto por komencantoj.

Mi ne komprenas la klarigon de « fulgoro » per « eldfuga » (kion signifas « eld- »?); ŝajnas ke oni celas lumskarabetojn, kies eŭropa speco nomiĝas « lampiro ». Unu strangaĵo koncerne uzon de tempoj: « Tion ni konstatas, kiam ni noktmeze veturos hejmen per taksiaŭtomobilo, kaj ili daŭras nin ». Kaj unu ĝustiga rimarko: la konstruado de « Sanssouci » ne estis imperiestro sed reĝo de Prusujo.

R-ano.

**Suplemento al la IEL-Jarlibro 1938.** Certe ĉiuj membroj de IEL estis tre kontentaj, kiam ili en la dua duono de oktobro ricevis ĉi tiun 32-paĝan suplementon kun la aldonoj kaj ŝanĝoj en la delegitaro post apero de la Jarlibro 1938, kaj kun konciza raporto pri la 30-a U.K. La Suplemento havas formaton iom malpli grandan ol la Jarlibro, tiel ke ĝi estas facile emetebila en ĝin. La eldono de Suplemento estas salutinda novaĵo; mi esperas ke ĝi reaperos ĉiujare. M.

**Libertempo en Svislando.** Afiŝego (64x111 cm) esperantlingva, prezentanta vojmontrilon, el kies kvar montrotabuloj tri surhavas la vortojn Printempo, Somero, Aŭtuno (kun konformaj bildoj) kaj la kvara surhavas la svisan blankkrucon sur ruĝa fono. La tuto estas tre ĝojkolora, kaj supre sur la vojmontrila fosto sidas birdeto ekkantonta. Tre plaĉa kaj efika afiŝo.

**Sankta Stefano, la unua apostola reĝo de la hungaroj.** Verkis D-ro Csaba Csapody de Féléregyháza. Eldonis la Hungara Esperanto-Federacio. — 12 p. teksto, 8 p. ilustraĵoj, kaj kovrilo. Formato 15,5 x 23 cm. Aperis kiel tria kajero en la serio de esperantistaj popoledukaj kajeroj. Havebla por 2 resp.-kup. de la redaktoro J. Mihalik, Sashalom, Hungarujo. — El Hungarujo ni ricevis ankaŭ tri flugfoliojn kun politika enhavo, pri la lastatempaj aferoj koncerne Ĉeĥoslovakion; la flugfolioj havas la titolojn: 1. **Al tutmonda Esperantistaro!** — 2. **Esperantistaro! Objektive pensantaj homoj!** — 3. **Pacon! Justecon!** — Intertempe hungaroj je 90 % ricevis kion ili deziris.

**Projekto de reforma programo de K-do Hagelen.** Flugfolio, prezentanta 25 tezojn « por paco kaj solvo de la problemo de senlaboreco » kaj 10-punktan komenton pri la programo. La flugfolioj oni povas peti de: J. Chr. Hagelen, v. Ostadestr. 174, Amsterdam Z., Nederlando.

**Petro Kropotkin: Al la junuloj! kaj: Biografio.** Traduko el la pola lingvo. — 54 p. 12 x 18 cm. Prezo broŝ. 6 fr.fk. Eldonis SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20, Francujo.

Biografio pri homo kiu serĉis la veron kaj la bonon, kaj kiu sekve fondis movadon, kiun la plimulto de la homaro konsideris kaj ankoraŭ konsideras krima. Liaj alvokoj al la junuloj estas psikologie tre lerte verkitaj kaj ankaŭ en niaj tagoj apenaŭ perdis sian efikecon. M.

**Lyon'a Internacia Foiro, 11.-21.Marto 1939.** Frutempe Lyon preparas sin por sia venonta Foiro. La afiŝo (formato 60 x 100 cm) montras en efika aranĝo la sunon de la foirpalaco, kiu jam antaŭĵetas sian lumon sur la terglobon. Samideanoj, kiuj povos efike pendigi la esperantlingvan afiŝegon (plej bone en iu montrofenes-tro), petu ĝin senpage de: Foire Internationale, Rue Ménestrier, Lyon, Francujo.

**Käänteentekevä keksintö.** (Lernu kaj uzu la plej facilan internacian lingvon Esperanto por kaj ĉe la Olimpiado de Helsinki!) Finnlingva flugfolio, eldonita de Finnlanda Esperanto-Instituto (Suomen Esperanto-opistolta, Kluuvik. 5 A, Helsinki).

**Caffé Ottino,** Piazza Carlo Felice 12, Torino, Italujo, eldonis poŝtkarton kun bildo de la kafejo, sur kies unu alstrata fenestregoj oni vidas nian stelon kaj grandliteran tekston: Esperanto-kunvenejo.

**Hoe lang zal dit nog duren?** (Kiel longe tio ankoraŭ daŭru?) Bone presita, tre efika flugfolio por propaganda vespero de grupo « Fine ĝi venkos » kaj de la Cseh-Instituto en Hago, kun bildo de Hitler kaj Chamberlain kun interpretisto antaŭ landkarto de Ĉeĥoslovakio.

# Tra la mondo

## Promenado.

La politikaj ŝanĝoj en Meza Eŭropo ne lasis sen emocio ankaŭ la esperantistojn. Tial neniun mirigos la fakto, ke la redakcio de « Heroldo de Esperanto » ricevis leterojn aŭ artikolojn de preskaŭ ĉiuj flankoj koncernataj. Tiujn voĉojn disponigis la redakcio al mi, por uzi el ili por mia rubriko, kion mi opinius konvena.

Bedaŭrinde oni malmulte atentis ke la organoj de IEL estas nepolitikaj. Mi ja rajtas, en mia resuma rubriko *tuŝi* la okazajojn, sed mi povas tion fari nur en maniero tre ĝenerala kaj singarda. Malgraŭ tio, ĉu oni kredus ke eĉ tiuj treege ĝeneralaj rimarkoj jam elvokis protestojn? Hungaro plendis, ke en la septembro « promenado » (kiu poste aperis en la oktobra numero de « Esperanto Internacia ») mi menciis nur la sudetgermanojn sed ne ankaŭ la hungarojn; sed fakto estas ke, kiam mi verkis tiun artikolon, ankoraŭ tute ne estis demando internacie pri la hungaroj en Ĉeĥoslovakio: tiu estiĝis nur post la iniciato de Mussolini. Nun unu germano (aŭstro) opinias, ke ne estas vere ke post la dispecigo de Ĉeĥoslovakio troviĝos miliono da ĉeĥoj (inkluzive de slovakoj kaj rutenoj) en la ceditaj teritorioj. La cifero, de mi indikita, memkompreneble ne estis precize elkalkulita, alie mi eble skribus 925.327, aŭ 821.649; ĝi estis « rondigita », ĉar en tiu ĉi okazo ja ne la cifero sed la penso eldirita estis esenca. Nia aŭstra samideano ankaŭ estas prava, dirante ke « cetere, kiu ne volos vivi en la nova regno, povos ŝanĝi kun alipopolano, ekz. germano devonta vivi en Ĉeĥujo povos translokiĝi Germanujon anstataŭante ĉeĥon vivontan en Germanujo, kaj inverse ». Vere, tiun rajton oni havas; sed ĉu vi opinias ideala tian novan popolmigradon? Centmiloj da homoj perdas sian ekzistadon, devas serĉi novan, kaj kiu iam spertis tion je sia propra korpo, aŭ ĉe siaj konatoj, tiu scias, kion signifas, en la nunaj cirkonstancoj konstrui al si novan ekzist-eblecon sub novaj kondiĉoj kaj novaj mastroj, eĉ se tiuj novaj mastroj estas sampopolanoj.

« Se la lordo Chamberlain vidus nun tiujn malfeliĉajn pilgrimantojn, se li en la momento de sia enveturado al Londono aŭdis la ĝemojn de la centmiloj... li ne estus aŭdinta la sonorilojn, kiuj lin bonvenigis », staras en artikolo, kiun sendis al « Heroldo » iu ĉeĥa samideano.

« Oni donis al ni novan patrujon », skribas samideano tute ne ŝovinista el la Olza-distrikto, « — sen pluaj rimarkoj! »

Laste skribis al « Heroldo » unu el la malfeliĉuloj, kiuj po dekmiloj estis de-

portitaj el unu lando al la landlimo de alia lando, kiu tamen ne volis akcepti ilin. La scenoj ĉe la landlimo estis teruraj, korrompantaj: « ... kaj tiu popolamaso — oni nombras 60-80.000 homojn — migras ĉe la limfronto, kuŝas, loĝas sur kampoj, kampstratoj, pereas, frenezigiĝas, ĉar la... registaro malakceptas ilin. Pro malsato, malvarmo kreskas de tago al tago la nombro de malsaniĝantoj, simmortigantoj, malvivantoj, precipe infanoj kaj virinoj. »

La malfeliĉo komenciĝis kun la germanaj rifuĝuloj el la sudeta teritorio: miloj, dekmiloj, centmiloj; ĝi daŭris per la rifuĝo de la ĉeĥoj, judoj, kaj germanaj marksistoj — aliaj dek- kaj centmiloj — el la teritorioj okupotaj de la germanoj; ĝi daŭras ankoraŭ ĉie, kie homoj estas devigataj konstrui novan ekzistadon, adaptiĝi al novaj kondiĉoj, obei al novaj mastroj. Vere estas nova Migrado de Popoloj. Pro kio? Nur pro tio, ĉar la homoj ankoraŭ ne atingis esti homoj envere. Ĉar ankoraŭ estas oferate al idoloj-moloĥoj. En pli fruaj jarcentoj tiu moloĥo portis la nomon de religio, pli vere: konfesio; nun ĝi nomiĝas nacio, ŝtato, aŭ ideologio. Ho, se oni volus el religio, el nacio fari verajn diaĵojn, ne idolojn! Religio, nacio estas grandaj valoroj; ili devus esti valoroj sanktaj, kaj subigitaj al la unu vera Dio, — sed kiel ofte ili estis profanataj, kaj estas profanataj ankoraŭ!

Sed mi kredas ke ni de nun povas likvidi en la IEL-organoj la demandon pri la politikaj okazintaĵoj de la lasta tempo. Ĉeĥoslovakio estas malgrandigita — tie regas nun funebro kaj malĝojo kiel post perdita milito; Germanujo, Hungarujo kaj Polujo estas pligrandigitaj — tie regas nun festoĝojo. La cetera mondo... meditas pri siaj pekoj.

Cetere la loko ne permesus publikigi ĉiujn artikolojn, tion vi komprenos, se mi denombros la nurajn titolojn: Kion volas diri ĉeĥoslovaka virino el la landlimujo al la mondo; La sudetgermana problemoj kaj Esperanto; La urbo de Rákóczi denove hungara!; Ĉeĥoslovakaj virinoj vokas la virinojn de la tuta mondo; Ni ne volas ĉeĥojn; Teruraj kruelaĵoj; Ĉu estas farita justeco? Centmiloj demonstraciis en Budapeŝto por redoni la sendependecon de la malgrandaj popoloj. Sed ankaŭ se ne mankus la loko, ĉu estus konsilinde, en la IEL-gazetoj publikigi ĉiujn ĉi sinkontraŭparolantaj politikajn artikolojn? Kaj se la redakcio publikigus unu, ĝi ne povus rifuzi ankaŭ la ceterajn.

Sudetgermana samideano atentigas pri la fakto ke el la delegitoj de IEL en

Ĉeĥoslovakio estonte kvindek malaperos el la jarlibro, kaj ke ankaŭ la unua Esperanto-monumento (en Franzensbad) troviĝas nun en la sola lando, malpermesinta ĉiujn Esperanto-organizaĵojn. Jen faktoj bedaŭrindaj, sed ili ne senkuraĝigos la esperantistaron kaj nur pli instigos ĝin al ekstrema fortostreĉado. En Nederlando ĵus okazis amaskunveno por Esperanto: 1500 ĉeestis! En Usono estas pretigata grava filmo, en kiu Esperanto trovas sian taŭgan lokon. El Brazilo, el Sud-Afriko, el Aŭstralio, el Japanujo kaj Ĉinujo, el la tuta mondo venas sciigoj pri apliko de Esperanto ĉe la Poŝto, ĉe Radio, ĉe Turismo, ĉe Filmo, aŭ — por politikaj celoj. Unu lando sin ekskludis. Sepdek landoj restas malfemitaj.

Rezignante paroli hodiaŭ pri apartaj okazintaĵoj, mi devas tamen menciigi unu aferon: En iu eŭropa ĉefurbo falis oficiala reprezentanto de alia ŝtato per la kugloj de knabo kiun malespero frenezigiĝis. Revenĝe en tiu ŝtato estas suferigitaj centmiloj da samrasanoj de la junulo. Kaj tio estas nomata justa rekompenco. Ne estas dubo: io en la mondo konfuziĝis. Dume ĝi — nia freneziganta pilko — plu turniĝas, malfeliĉaĵoj kaj akcidentoj sinsekvas unu al alia: la duobleco de l' okazado denove elmontriĝis per la teruraj brulegoj en Marseille kaj Oslo, la ŝtatoj daŭrigas sinarmi, la ŝtat-kaj partiestroj plu faras siajn oratorajojn, suno kaj luno havas siajn eklipsojn, homoj akcidente aŭ nature mortas, homoj kaj entreprenoj naskiĝas, kreskas, laboras, jubileas, — kaj jen mi atingis la punkton kie mi volas fini: « Heroldo de Esperanto », la semajna organo de la Esperanto-movado, festas la aperon de la 1000-a numero. Mi gratulas kaj esperas ĝisvivi ĝian 2000-an.

Zigzagoo.

### La kontraŭuloj asertas

ke Esperanto ne havas radikojn en la sango kaj tero de iu popolo, kaj ke tial ĝi estas rifuzinda. Sed la lingvomaterialo de Esperanto je 99 % ja tute ne estas libere eltrovita; ĝi estas prenita el la jam ekzistanta materialo de l' hindo-eŭropaj lingvoj, kaj sekve ĝi jes radikas « en la sango kaj tero » de hindo-eŭropaj popoloj.

Sed eĉ se Esperanto estus tute libere elpensita, sen la uzo de ekzistanta lingvomaterialo, ĉu t i a l ĝi estus rifuzinda? Ĉu aŭtomobilo, ĉu aeroplano, ĉu radio havas radikojn en la sango kaj tero de iu popolo? Kaj tamen ili estas akceptitaj. Kial? Ĉar ili signifas progreson en la evoluo de la homara kulturo. Ĉar ili utilas. Samkiale oni akceptos ankaŭ Esperanton, kaj tion faros eĉ tiuj, aŭ la posteuloj de tiuj, kiuj hodiaŭ ĝin kontraŭbatalas.

# Selma Lagerlöf 80-jara

(Ŝi naskiĝis la 20.11.1858.)

En ĉi tiu mallonga artikolo ni ne faros detalan biografion, nek analizon de la verk-arto de S. Lagerlöf, sed nur skizajn rememorojn. Prefere ni pritraktos iom ŝian hejmon de la infanaĝo, kiu ja havis gravan signifon por ŝia evoluo.

En Svedujo oni vendis ĉ. du milionojn da volumoj el ŝiaj verkoj, kaj ankaŭ eksterlande ŝiaj verkoj atingis pli grandan disvastiĝon, ol iu ajn alia sveda verkisto. Ĉi tiu fakto estas iom kurioza, ĉar ŝian verkadon karakterizas ne nur naciaj, sed eĉ provincaj ecoj. La kaŭzo de la internacia ŝato estas tio, ke ŝiaj temoj estas ĝenerale-homaj.

Sian familian bienon, Marbacka, la verkistino transformis je modela farmo. Kelkajn jarojn post la morto de ŝia patro, oni devis vendi la malnovan Marbacka, kiu poste havis plurajn posedantojn. En 1906 oni proponis al S. Lagerlöf ke ŝi aĉetu la bienon, sed ŝi ne havis sufiĉe da rimedoj. Anstataŭe ŝi aĉetis bieneton en Falun, kie ŝi vivis kun siaj patrino kaj onklino. Kiam lastnoma mortis (1911), oni kondukis ŝin al O. Amtervik (naskiĝoloko de S.L.), en kies tombejo kuŝas la familia tombo de la Lagerlöf'oj. S. Lagerlöf kaj ŝia fratino ĉeestis la enterigon kaj ricevis okazon por viziti la iaman infanaĝan hejmon. Jene ŝi priskribas siajn impresojn pri la proksimiĝo al la hejmo :

« Ni tre ĝojis, kiam ni rimarkis, ke la Ripozŝtono flanke de la vojo al Marbacka ne estis forprenita... Ni vidis, ke la betuloj, kiuj kreskis sur unu flanko de la vojo de Ripozŝtono ĝis la bieno, kaj kiujn plantis nia avo, ankoraŭ staris samloke. Ni sentis, ke ni estas la veraj posedantoj de ĉi tiu tero. Niaj praavoj loĝis tie, konstruis tie, ekplugis tie. Oni ne rajtas forpreni nian grundon. Ni sentis simile al tiu, kiu forestis dum longa vojaĝo... »

Pli poste Selma Lagerlöf sukcesis aĉeti por si la loĝdomon kaj ĝardenon. Post la ricevo de Nobel-premio (1909) ŝi aĉetis ankaŭ la tergrundon kaj transformis la konstruaĵon je pli granda, moderna vilao. Somere plej diverslandaj turistoj invadas tiun regionon.

La malnovan sinjoran bienon posedis la patro de Selma Lagerlöf, leŭtenanto E. G. Lagerlöf (1819-1885), edziĝinta al Lovisa Elisabeth Wallroth (1827-1915). Kvar infanoj kreskis en Marbacka, du knaboj kaj du knabinoj.

Kiam Selma iĝis 4-jara, ŝiaj kruroj paralizigis. Post kuracado en Strömstad ŝi denove ekiris, sed unu el la kruroj ne tute reboniĝis kaj la eta Selma devis rezigni pri multaj ludoj kun siaj sam-aĝuloj, jen kio frue evoluigis ŝian emon

vivi en la mondo de fantazio kaj verkado. Kiel sepjarulino ŝi hazarde trovis romanon, kiu malkovris por ŝi novan mondon kun heroaĵoj, nobluloj, aĉuloj ktp. kaj vikle funkciigis ŝian fantazon. Laŭ propra rakonto ŝi jam tiam songiŝis pri verkado de romanoj. Naŭjara, ŝi devis vojaĝi al Stokholmo pro sia malsana kruro, samfoje oni portis ŝin al la opero kaj drama teatro. Denove malfermiĝis nova mondo, kaj ŝi ekemis verki teatraĵojn, kion ŝi efektive faris.

La patro multe okupiĝis pri siaj infanoj. Selma adoregis lin. Estas karakterize, ke ĉe la ricevo de la Nobel-premio, kiam ŝi devis fari dankparoladon al la Sveda Akademio, ŝi formis ĝin je konversacio kun sia patro, kiun ŝi fantazie vizitis en la ĉielo por raporti pri la granda novaĵo.

La patra avino, mortinta en 1864, enkondukis la etan Selman en la regnon de la legendoj. Ŝi rakontadis legendojn de mateno ĝis vespero. Kiom forte impresis la rakontoj la fantazon de l' infano, jenmaniere pentras S. Lagerlöf en la « Legendo pri Gösta Berling » :

« Jene aŭskultis infano la rakontant-inon, laboristojn, maljunajn sinjorojn, ĉe la fenestro dum vintra vespero, ne vidante nubon sur la ĉiela rando, sed la nuboj transformiĝis je kavaliroj, kiuj pelveturis en unuĉevala veturilo, kaj la steloj ŝajnis kandeloj en malnova bieno. Ĉar la kapon de l' infano plenigis figuroj el pasintaj tempoj... Sed se tiun infanon, kies tutan animon regis legendoj, oni sendis en malluman subtegmenton aŭ senluman ĉambreton por alporti iun aĵon, ŝiaj piedetoj klopodis kiom eble plej rapide elveni de tie. Ĉar tie, en la nigro, ŝi devis pensi pri ĉiuj malnovaj fantomhistorioj... »

Antaŭ ol ni forlasos la malnovan Marbackan, ni redonas parton el la « Mirinda vojaĝo de Nils Holgersson », kie la verkistino priskribas viziton en la malnova hejmo kaj revekitajn memorojn :

« Oni vivis bone en tiu loko. Oni havis laboremajnojn, sed ankaŭ dimanĉajn festojn, streĉan laboron dumtage, sed vespere oni kolektiĝis ĉirkaŭ la lampo kaj laŭtleĝis. Oni kulturis grenon, sed ankaŭ florojn ŝpinis linon, sed ankaŭ kantadis akompane. Rompis la kapon per historio kaj gramatiko, sed ankaŭ ludis teatron kaj skribis versojn. »

Selma Lagerlöf eliris en la mondon. En 1881 oni akceptis ŝin en la knabinan liceon de Sjöberg en Stokholmo kaj en 1882 en la altan instruistinan seminarion, kie ŝi restis dum tri jaroj. Dum la literaturaj lecionoj ŝi pensis pri la verm-

landaj tradicioj kaj legendoj, kiuj donus riĉan materialon por verkado. En 1885 ŝi okupis instruistinan postenon en la elementa lernejo por knabinoj en Landskrona. Ŝia seminaria kamarado Gurli Linder sendis kelkajn poemojn de Selma Lagerlöf al nobelino Sophie Adlersparre, eldonantino de « Dagny », kaj en 1886 la aŭtorino ricevis kuraĝigan leteron. Oni reprenis plurajn el ŝiaj poemoj, precipe sonetojn, dum la sekvintaj jaroj, sed ili ne vekis atenton.

Dum printempo de 1890 la gazeto « Idun » anoncis konkurson, al kiu S. Lagerlöf ensendis kvin ĉapitrojn sub titolo « El la legendo pri Gösta Berling ». Ŝi ricevis la unuan premion, oni presigis la ĉapitrojn, kiuj gajnis ĝeneralan plaĉon. Postan jaron aperis la tuta « Gösta Berling ». Per genia fantazio kreis la aŭtorino aron da strangaj kaj altgrade originalaj figuroj el pasinta tempo. Ĝi estis edo el la iama vivo de sinjora bieno, kiu katenis la leganton per la nova kaj riĉa materialo, ankaŭ per la originala rakontmaniero. Sed la verko kiel arta tuto ricevis severan kritikon kaj malfacile disvastiĝis. Ĉio ŝanĝiĝis post la faka, varma rekono de la granda dana literaturkritikisto, Georg Brandes, kaj en 1895 Gösta Berling elvenis en nova eldono. Kvankam S. Lagerlöf poste kreis arte pli maturajn verkojn, la « Legendo pri Gösta Berling » estas ŝia plej disvastigita kaj admirata kreaĵo.

Dum 1894 sekvis la rakontaro « Nevideblaj ĉenoj ». Sekvintan jaron la verkistino ricevis subvencion de reĝo Oskaro kaj princo Eŭgeno, ankaŭ iom de la Sveda Akademio. Nun ŝi decidis, ke ŝi tute dediĉos sin al verkado. Post studvojaĝo al Italio aperis en 1897 ŝia romano « La mirakloj de antikristo », priskribanta sicilian popolan vivon. En 1899 ŝi eldonis la novelaron « Reĝinoj en Kungahälla » kaj ankaŭ la rakonton « Sinjora bieno ». Post vojaĝo dum

Laŭ melodio amata :

Karl Vanselow :

## Kanto de Solveigh

(Laŭ la melodio de Edv. Grieg el «Peer Gynt».)

Ĉu vintra neĝ' fandiĝas,  
printempo pasas for,  
Ĉu velkas la somera  
kaj la aŭtuna flor',  
Kun pacienca koro  
fidele tie ĉi  
En amo kaj sopiro  
vin atendadas mi.

Preĝadas mi, ke Dio  
vin ŝirmu en danĝer'.  
Sed se la sort' kunigos  
nin ne plu sur la ter',  
Kun pacienca koro  
plu atendados mi,  
Ĝis Dio unuigos  
eterne nin ĉe si.



# Raporto de Anĝelo

Dio sidis sur sia grandega ora trono kaj trarigardadis aferojn el diversaj planedoj de ĉiuj sunsistemoj, kiam estis dirate al li, ke alflugis la Anĝelo, sekreta observinto de la Tero, kaj urĝe petas aŭdiencon.

— Kiel li tiel subite venis kaj forlasis sian postenon? Ankoraŭ ne estas lia tempo.

— Oni ne scias. Li ĉion kaŝas kaj estas tre pala.

— Denove aferoj de la Tero!

Dio ĉagreniĝis kaj rigardis malsupren, kie naĝis perfektorde miliardoj da steloj kaj steletoj diverskoloraj. Tuta spaco plenplena moviĝis kaj brilis. Dio rigardis tien kaj serĉis la Teron. Nur kun peno malproksimege en la krepusko li trovis ĝin.

— Simila al polveto, jen fine ĝi — nesekigebla fonto de miaj doloroj! Jen la Tero! Tie mi starigis la plej altan vivan estaĵon kun la *homa* nomo, donis al li konsciencan kaj saĝon, donis al li fekundajn kampojn, riĉajn arbarojn, marojn; li ricevis de mi saton, abundecon, bonhumoron kaj feliĉon; sed al homoj ankoraŭ ne sufiĉis. Ili tediĝis kaj plorante petegis denove, ankoraŭ kaj ankoraŭ. Sian bonstaton ili nomis mizero, sian naturan altan konscion malklereco kaj mallumo. Mi multfoje cedis, donis al ili la novajn akiraĵojn; sed neniam sufiĉis. Homoj petis kaj ricevis la *feron* kun celo pli facile metii, sed ili tuj el-

forĝis lancojn kaj kanonojn, detruante unu la alian. Ricevinte la *oron*, ili kreis sklavecon, kaj de tiam ĝis nun dancas ĉirkaŭ la ora bovido piedpremante pli malfortajn. La paco rifuĝis de miaj infanoj. Antaŭ nelonge mi sendis tien *mian amatan filon* porti al la mondo amon kaj la humilecon; sed ili rikanis, primokis kaj krucumis lin. La malgranda planedeto kun siaj nehomecaj homoj — kiom multfoje ĝi dolorigas mian koron. Ho Tero, Tero!

— Raportonta Anĝelo atendas, ĉu enlasi?

— Senprokraste, kvankam tie atendas jam pli frue venintaj de Urano, Jupitero kaj Saturno: sed ne gravas, Anĝelo ja venas de la Tero, kie vivas la homaro.

Tuj eksonis la trombonoj de brilantaj heroldoj, kiuj laŭtigis: Anĝelo, observinto de l' Tero, al aŭdienco!

Konsternite ekmoviĝis ĉiuj sep ĉieloj: Ekstervica aŭdienco — tie ĝis nun ne vidita! Kio okazis? Ĉu la Tero deviis; kaj minacas kolizio?! Pro kies malatento nia?

— Tute ne, ĉar temas pri la homaro!

— Kio malbona okazis? — Tamen neniu povis respondi. Nur de la Tero alfluginta Anĝelo eniris la Dian palacon kaj genuis.

— Stariĝu, parolu! Kio kaŭzas vian neatenditan venon?

— La *sango*. La popoloj pretiĝas elverŝi grandan mezuron da sango, riĉe

sterki la kampojn kaj la ĝardenojn per kadavroj, por longe satigi la korvojn. Laŭ ilia projekto la kampoj devas esti tombejoj, urboj — ruinejoj kaj cindrejoj, akvoj kaj aero — veneno. Kaj en tiu granda intenco ĉiu petas Vian helpon. Kion fari?

Dio ektimis.

— Ĉu mi ĝuste aŭdis? Kara Anĝelo, ripetu!

Anĝelo ripetis. Dio kun angoro aŭskultis kaj, meditante momenton, ek-silentis.

— Sed, ŝajnas, vi ĵus hieraŭ sciigis, ke laŭ la insista peto de multaj popoloj vi sukcesis fini militojn post la Franca Revolucio kaj ĉiuj popoloj promesis ĉiam vivi en konsento?

— Jes, tiel estis.

— Iom poste al mi venis sur Tero mortinta iu ministro kaj rakontis pri la Sankta Alianco, fondita de kelkaj reĝoj kaj eĉ unu caro, laŭ kiu la paco estas sekurigita por eterne?

— Jes, aliancoj multfoje estis fonditaj, sed la paco forestas. Homoj plu ne amas fidelecon kaj verecon. Vortrompado ĉie: sur la foirejoj, sur la stratoj en kabanoj kaj kasteloj, en atestoj, en diplomatio. Eĉ en la preĝejoj antaŭ la altaro donita *jes* jam *ne* estas *jes*! Ĉie trompoj: de la pinto ĝis la radiko. Pro tiuj kaŭzoj, al ĉiu aserto, decido, subskribata protokolo, la ĉeestantoj ne povas kredi kaj post la tago jam ne plenumas. Tial ili devas preskaŭ ĉiutage denove kunveni, diskutadi, babiladi, denove ĵuri vortenanon, post kio ĉiuj kun sekreta rideto returniĝas hejmen. Tiun ĉi komedion oni ludas senfine. En neniu alia mondo estas tiom da kunsidoj, decidoj, paroladoj, traktadoj, teorioj, proponoj kaj konsiloj kiom sur la Tero. En tiu urĝa bruo kaj multlaborado nur por pripensi ne restas la tempo, ĉio cetera estas en plena ordo.

Dio aŭskultante skuis la kapon kaj flustre aldonis:

— Do ili kun sia scienco kaj filozofio tamen restis nur infanoj, ĉion nur ludas senrespondece. Sed diru al mi: ĉu ili tute forlasis la vojon de mi signifan, prave nevastan, laŭ spirito, konscienco kaj amo?

— Ili devis forlasi, ĉar ili ne povis lokigi sur ĝi siajn nuntempajn trezorojn: la memamon, fierecon, malestimon, soifon je laŭdo kaj potenco; tial kruelaj okazaĵoj ofte kaj pli ofte anstataŭas la bonfarojn.

— Ĉu vere tiel kondutas la homoj, kiuj fieras, ke plu ili ne havas la sklavecon? kiuj, por pravi tion, eĉ fondis ŝtaton kun la bela nomo: *Liberio*?

— Ho, Sankta Eternulo, daŭrigis Anĝelo, la homoj ne estas kapablaj vivi, ne estante sklavoj al io. Unuan formon de la sklaveco ili vere forĵetis, sed tuj kreis alian, pli fortan. Nun ilia idolo estas la *maŝino*. Apud ĉiupova maŝino la homo estas kiel nesignifa rubo kaj aku-

1899-1900 al Oriento ŝi publikigis la unuan parton de la granda verko « Jeruzalemo » (« En Dalekarlio ») kiun germana kritikisto konsideris kiel libron pri la animo de Svedlando — « en neniu antaŭa libro esprimiĝis tiel la popol-animo, kaj neniam oni prezentis tiom vive, objektivite kaj delikate, la vivadon kaj farojn de religia komunumo ». La dua parto (« En la sankta lando ») aperis en 1902.

La malgranda spaco ebligas al ni nuran mencion de ŝiaj pli gravaj verkoj kaj viv-eventoj: 1904: « La mono de sinjoro Arne », « Kristlegendoj », la granda ormedalo de la Sveda Akademio. 1906-07: « La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson tra Svedlando ». 1907: fil. honora doktoro ĉe la universitato de Uppsala. 1908: « Legendo pri legendo », festado de 50-jara jubileo. 1909: literatura Nobel-premio (la unuan fojon al svedino). 1911: parolado ĉe la internacia kongreso en Stokholmo por la voĉdona rajto de l' virinoj. 1912: « La veturigisto ». 1914: « La imperiestro de Portugalujo », membrigo en la Sveda Akademio. 1925: « La ciklo de Löwensköld » kaj « Charlotte Löwensköld ». 1926: medalo « Illis

quorum meruere labores » (Al tiuj kiuj merite laboras).

★

Selma Lagerlöf estas tradukita en tre multajn lingvojn. Sed kiom el la tradukoj estas faritaj laŭ la originala sveda fonto? Verŝajne ege malmultaj. Por ni, esperantistoj, majstra traduko de la svedesperanta romanverkisto, Stellan Engholm, talente konservis la sukono de la originaloj: « Gösta Berling » kaj « La mono de sinjoro Arne ». Ankaŭ fil. mag. O. Frode fidele redonis « La ĵurnalino de Stormyr » kaj « La infanoj de Betlehem » de Selma Lagerlöf. Verdstelanoj plej bele festos la grandan amikindon de nia lingvo (ŝi ja permesis la esperantigon de siaj verkoj bonvole rezigninte pri la financaj rajtoj de l' aŭtoro) legante kaj relegante la profundajn verkojn de la apostolino de l' noblaj, pacaj sentoj homaranaj.

La subskribinto, kies filineton, Dorica-Selma, la aŭtorino honoregis per akcepto de baptopatrineco, aldonas aparte varmajn sentojn de danko kaj deziro pri bona sano.

Tiberio Morariu.

rate obeas al ĝi : nokte kaj tage. Eĉ en la dormo li devas atenti maŝinajn ordonojn donitajn per la fajfiloj, sirenoj kaj sonoriloj. Tiam la homo nokte jam ĝustan ripozon ne konas, la silenton forĝesis. Tage sur la vojoj kaj stratoj li bedaŭre flankeniĝas laŭ signaloj de promenanta maŝino. Apud senanima maŝino fariĝis la homo mem senanima, apatia. Kaj ankoraŭ pli : Kiam la maŝinoj el fabrikejoj, tenejoj, el ŝtatrezervoj amasiĝas kaj kun granda aplombo veturas koncerti en verdaĵojn, tiam ilin aŭskultadi rapidegas milionoj da plejfortaj homoj, kaj tie... pardonu, mi timas eĉ ripeti...

— Anĝelo mia, ne timu, diru ĉion !

— ... tie la homoj antaŭ la maŝinoj ne nur genuas, kiel antaŭ Vi, sed eĉ kuŝe metas sin en la sablon, koton kaj akvon. Tiel granda estas ilia respekto rilate al la maŝino.

— !!!

— Jes, tion mi povas aserti kun ĵuro ! Sur la koncertlokoj poste ĉiam elkreskas la krucbaroj, larmolagoj kaj riveroj kun ruĝa enhavo.

— Kion vi rakontas, Anĝelo, Anĝelo!

— La veron !

— Mia lumo, ĉu vi jam ne atingas la mondon ?

— Lasu al mi rimarki, ke homoj jam havas propran lumon. De la maŝino nutrataj lampetoj imitas la stelojn kaj Sunon. Sur la Tero estas pli hele ol antaŭe, nur la artefarita maŝina lumo ne varmiĝas, la koroj frostas, sed homoj ne komprenas la kaŭzojn.

— Kial do ? !

— Ĉar sur la Tero ora mono egalas al la papera.

Dio estis tre ĉagrenita, sed tamen daŭrigis la esploron : Dum jarcentoj mi sendis tien miajn helpantojn : spiritegulojn, grandajn instruistojn, verkistojn kaj aliajn astrojn, kiuj devis naskiĝi inter la homoj kaj delogi ilin de la vaglumoj. Ili portis tien *Renascon* kaj la plibonigon, kelkaj el ili eĉ nuntempe estas tie. Ĉu ilia efiko tute ne helpas ?

— Por tiujn kompreni, oni devas zorgi pri la kapo, sed inter la homoj en nomo de bruega sporto la kapo fariĝis jam malmoda. Ili nun preferas kaj laŭdas la muskolajn piedojn, pugnoj kaj la fortajn makzelojn. Pri tiuj oni ĉiutage faras bildojn, enmetas en la gazetojn kaj la ekstaza amaso ilin adoradas ; la kapon oni ne mencias ; tiu ĉi malfacila aparato jam preskaŭ ne estas bezonata, ĝi nur povas obstakli per sia pezeco atingojn ĉe altsaltado, vetkurado ktp.

Dio estis tre ekscitita. Post ioma merito li denove ekparolis :

— Eble mi mem estas kulpa. Mi lumiĝis la homan spiriton laŭ Dieca similo ; sed, evidente, ili ne povas porti tian ŝarĝon. Malfeliĉuloj ! Antaŭ miljaroj mi perfektigis la homan korpon : Mi forprenis la voston kaj pligrandigis la ka-

pon, sed nun ili jam bojkotas ĝin. Ĉu ne repreni la cerbon, kaj voston redoni ?... Ŝajnas, ke la plimulto inklinas al tio.

Anĝelo silentis.

— Evidente, de malnobla uzado la kapo jam atrofiĝis. Kiel alie estus klarigebla ilia konduto, ekzemple : iuloke oni memvole bruligas milojn da vagonaroj de tritiko, kafo, maizo, buĉas centmilojn da porkidoj, elversadas sur la ŝoseoj trajnojn da lakto ktp. ktp., — dum aliloke malsatas la homoj, mortas pro manko de nutraĵo miloj kaj novaj miloj da senkulpaj infanoj. Eĉ tian facilan problemon homoj jam ne povas home solvi ! Ĉu ne redoni la voston al ili ?

— Kaj tiel abomene kondukante, ili ankoraŭ tro ĝojas ! Mi jam ĉi tie dormi ne povas. Ili ĉiam bruas, ludas kaj kantas tage kaj nokte, senfine.

— Pardonu, ekparolis Anĝelo. La homoj ne estas tiel gajaj. Kontraŭe, ili ĝemas kaj kalkulas la tagojn, kiuj restas ĝis la katastrofo. Tamen, vere, sur la Tero tage kaj nokte oni bruegas, kantas, muzikas kaj ridegas, sed ĝi estas la maŝino kun homa voĉo. De malproksime ŝajnas la gajeco grandega — sed tiuj ne estas la homoj : ĝojas pagita maŝino.

— Ankoraŭ novaĵo ! (Sekvis mallonga silento.) Vi, Anĝelo, atestas, ke ili ĝemas, sed tamen pretigas la *militon* ?

— Jes.

— Sed kion faras miaj *idealistoj*, kial ili ne agas ? Ĉu ili plu ne instruas amon kaj pardonemon ?

— Ili agas, sed estas flankenigitaj, portas la nomon : voĉoj en la dezerto. Regas nun aliaj intereso. Estintajn vojsignojn ili jam malmulte komprenas. Eĉ lastan plej karan ĉielan donacon, *verdajn vojstelojn*, montrantan la vojon al la altaro de tutmonda paco, la homoj malbone vidas, ĉar ilia vidhorizonto supre malvastiĝis, malsupre iom pli vastiĝis. Ili ĝemas, sed tamen migras sur la vojo de suferoj, suprajn signojn ne atentante. Mi ĵus vidis, daŭrigis Anĝelo, la lastajn ĉapitrojn de historio sur la Tero. Ĉefan lokon okupis la ĉapitroj : Fizikkulturo kaj maŝinopoko ; edukado de homoj por rekordoj, vetluktoj, bataloj, kies fina punkto estas milito ; materialismo, kc. Forestas amo, frateco kaj...

— Sufiĉe ! interrompis Dio. Ili, la homoj ne meritas mian savon ! Mi lasos ilin droni en memkreita malfeliĉo. Nenion plu mi deziras scii pri la Tero. Vi povas foriri.

Sed Anĝelo ne foriris. Li falis sur la vizaĝon kaj plorante preĝis por la tera enloĝantaro :

— Alta Kreanto de la mondoj, ne forlasu, ne subigu la homojn. Helpu al erarantoj ! Kompatu kaj pardonu !

Pli kaj pli arde preĝis Anĝelo por la malfeliĉa homaro. Dio silente aŭskultis

kaj meditis. Subite li ekrigardis trans la randon de sia trono malsupren kaj mirigite ekkriis :

— Kara Anĝelo, vi preĝas pro Tero, sed rigardu kion ili faras ! Kio estas ĝi ?

De la Tero alteniĝis giganta incendio. Brulis unue Eŭropo. Fajretaroj amase traflugadis la marojn al ceteraj kontinentoj, kaj fajromontoj rapide ĉie kreskis.

Kaŝinte sin en la flamoj terure ridegis diversskalaj pafilegoj. La fajro ilin kreis, en fajro, en propra elemento, ili ĝojegis kaj palpatis la viktimojn dezirante foje plej festene satmanĝi. Kiel Tero tremis ! Kiel ĝi ŝvebis ! Malfeliĉa, malluma Tero !

Sed mortomaŝinoj en aero, sur la tero kaj maro ĉiam plialtigis sian inferan kanton, ebrie trinkadis el malpermesita plej sankta ruĝa kaliko kiel iam punita, freneza reĝo Belzacaro.

Multaj steloj angorkomplete de proksime kaj malproksime ekrigardis la Teron kaj je sekundo malatentis sian propran orbiton. Sekvis multaj kunpuŝiĝoj en la spaco, kiu tondris, moviĝis kaj ondegis kiel bolanta maro. Suno malaperigis sian vizaĝon. Ĉielanoj estis konsternitaj, nur Dio staris senmove kaj profundfunebre flustris :

— Homaro, homaro, per ŝtonoj, krumoj, malliberejoj, per brullignaĵoj kaj pendigiloj vi rekompencis al genioj, instruistoj al vi veron kaj amon. Jen kion vi atingis sen ili... ! Kaj Dio esploris.

— Kampatu ! daŭrigis preĝi Anĝelo. Jen staras iliaj forlasitaj urbegruoj tute malplenaj de homoj. Sur estintaj stratoj, kovritaj de sovaĝa herbo, varmiĝas aspidoj kaj serpentoj. Per blindaj senvitraj fenestro-okuloj rigardas domoj malpurigitaj de strigoj kaj vespertoj. Jen maturaj ondiĝas riĉaj grenkampoj sen laboristoj, ĉar gefalĉistoj kuŝas senvivaj inter grenotigoj, neenterigitaj...

— Mi kompatos ! Venu post minuto kaj mi donos novan vivoprogramon por la Tero ! Elble *prudento* de l' homoj restintaj nun revenos.

Anĝelo eliris.

Terlingve de E. Erhards, Latvio.

## Pravaj vortoj

*La esperoj estas sonĝoj de maldormanto.* Pindar.

★

*Oni trovas mil instruistojn, ĝis oni renkontas unu saĝulon.* Klinger.

★

*La bono parolas per simplaj, klaraj vortoj, la malbono sin volonte envolvas en enigmojn.* Raupach.

★

*Se ekzistas tiom da opinioj ol ĥapoj, tiam ekzistas ankaŭ tiom da ĥoroj ol diversaj specoj da amo.* Tolstoj.



# LA ESPERANTISTA REKLAMO

## La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldeno, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organo de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

**Naskiĝo Scolnik.** La 2.6.1938 naskiĝis al gesamideanoj D-ro Jaime Scolnik kaj Alicia Guastavino Scolnik Centurión en **Córdoba**, Argentino, filino, kiu ricevis esperantan antaŭnomon « Aminda ». — Koran gratulon!

**Naskiĝo De Vrieze/Sanders.** La 22.10. naskiĝis al gesamideanoj De Vrieze-Sanders en **Drachten**, Nederlando, filineto kiun ili nomis: Ali Elisabeth, Maria. — Koran gratulon!

**Geedziĝo Firiczky-Pipinić.** La 6.11. okazis en **Osiĵek**, Jugoslavio, la geedziĝo de ges-anoj Ladislav Firiczky, librotenisto, IEL-delegito kaj prezidanto de Esp.-Societo « Verda Stelo », kaj Dragica Pipinić (nask. Koprivšek), priv. oficistino. — Ni kore gratulas!

**Letervespero okazos la 10-an de decembro.** Sendu amason da leteroj, poŝtkartoj, raportoj, poŝtmarkoj, afiŝoj, fotoj, broŝuroj ktp. al Naestved Esperanto-klub, Thorsvej 9, **Naestved**, Danlando. (553)

**Poŝtkart-vesperon** okazigos la Stretforda Esperanto-Societo la 13-an de decembro. Ni petegas, ke samideanoj skribu al ni multnombre, kaj promesas nepre respondon al ĉiuj. Adresoto: S-ro H. E. Wyatt, 59, Braemar Avenue, **Stretford, Manchester**, Anglujo

**Letervesperon** okazigos la Esperanto-klubo « Mara Vento » la 28.12. 1938. Ni atendas ilustritajn kartojn kaj leterojn el la tuta mondo. Respondo garantiata! Skribu multnombre al: S-ro Olav Thormodsen, Haugeveien 88, **Haugesund**, Norvegujo.

**Letervesperon** aranĝos la 4-an de januaro grupo « Merkurio », sekretariejo: Schiedamscheweg 151a, **Rotterdam**, Nederlando. Skribu el ĉiuj kontinentoj! Respondo nepre garantiata.

**Letervesperon** organizas la Flandrema Grupo Esperantista, Carnotstraat 70, **Antwerpen**, Belgujo, je la 18-a de januaro 1939. Esperantujanoj, skribu multnombre al ni! Ni antaŭdankas, kaj garantias respondon.

**Al ĉiuj perlo-amantoj en la mondo!** Vi povas ricevi belegajn perlojn plej favorkoste de ni. Por prov-aĉetantoj la kosto por unu belega perlo estas nur po 5 jenoj aŭ egalvaloro. La pagojn ni deziras antaŭricevi, sed oni povas ankaŭ postpagi. Certe, krom tio, ni komercas ankaŭ pli superajn perlojn; ni traktas en Esperanto, angla, franca, kaj germana lingvoj. Do, ĉiu tuj provmenu unuon al: Caroline Pearls Company (Saburo Kato), **Angaur Island**, Caroline, Pacific. (554)

**9 kurspartoprenantoj**, 18—40-jaraj, deziras korespondi kun geeksterlandanoj pri ĉiuj temoj. Adreso: S-ro Elis Lövgren, Kungsgatan 12, **Avesta**, Svedujo.

**25 gelernintoj de Cseh-kurso** deziras korespondi kun ĉiulandanoj, pri ĉiaj temoj, per leteroj kaj poŝtkartoj ilustritaj. Adreso: Jos. Ornstein, Ligt. 27, **Porsgrunn**, Norvegujo.

**Kiu sendos al Brazila Ligo Esperantista** (Praça da República 54, **Rio-de-Janeiro**, Brazilo) du poŝtajn respond-kuponojn, tiu ricevos Esperante redaktitan poŝtkarton kun poŝtmarko de la Internacia Filatelio Ekspozicio, okazinta en Rio-de-Janeiro, aŭ kun esperantista poŝtmarko ilustrita per dukolora poŝtstampo (la literoj estas nigraj kaj la stelo verda). Kiu sendos tri kuponojn, ricevos la samon en koverto. (552)

**Komerco kun Nederlando.** Kontraŭ modesta tarifo mi esploras viajn komerco-eblecojn en Nederlando. — Hans Bakker, IEL-delegito, v. Tuyl v. Serooskerkenplein 33, **Amsterdam-Z.**, Nederlando.

**IEL-delegito deziras trovi korespondantojn** por siaj tri skoltinaj lernantoj. Unue poŝtkarte, poste letere laŭ volo. Mi persone garantias respondojn. P. H. Lewis, XPDO House, **Didcot, Berks.**, Anglujo.

**La delegito de IEL en Valencia** petegas ke oni sendu al li nenian komunikadon.

**Juna fraŭlino** petas uzitajn poŝtmarkojn por ebligi resanigan restadon en Svisujo. — F-ino C. J. Schouten, Vaartweg 70, **Hilversum**, Nederlando.

**Poŝtmarkojn interŝanĝas** kun ĉiuj landoj, peco post peco (respondo garantiata) instruisto Kühnel, **Frederikssund**, Danlando.

**33-jara instruistino** deziras korespondi kun samideanoj; prefece kun angloj, holandanoj, belgoj kaj svisoj. Tove Lindholm, Vejby Skole, **Vraa**, Danlando.

**Junulo deziras korespondi** kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Eugeno Buchwald, Körömczi utca 14, **Szombathely**, Hungarujo.

**S-ro Evert Karlsson**, Ncraskoggatan 4, **Nora**, Svedujo, kontoristo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun alilandanoj. Afranku filatelie!

**S-ro Gunnar Skogh**, metallaboristo, Storgatan 16, **Nora**, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiulandanoj, interŝanĝi poŝtmarkojn, bonilustritajn gazetojn, fotojn ktp. Certe respondas.

**Sveda laboristo deziras korespondi** kun samideanoj ekstere de Eŭropo, plej volonte ĉino aŭ ĉinino. Adreso: Olof Avelin, Agnesdal, **Hallstahammar**, Svedujo.

**18-jara sveda komencanto** deziras korespondi kun gejunuloj en la tuta mondo. Adreso: S-ro Sven Svensson, Hagalund, **Vittaryd**, Svedujo.

**Poŝtmarkojn interŝanĝas** kun seriozaj filatelistoj. Sendu 50-75, mi sendos saman kvanton samvalore laŭ Michel. Karl Närä, Högbergsgatan 6, **Örnskölsvik**, Svedujo.

**Mi deziras korespondi** kun tutmondaj gesamideanoj, mi kiu loĝas sur mistera kaj izolita insulo en Sudmaro. Saburo Kato, **Angaur Island**, Caroline Pacific.

**Por filatelistoj!** Novaj poŝtmarkoj aperos en novembro. (Jubilea serio tre valora.) Ili estos sendataj senpage al ĉiuj. Por afranko unu respond-kupono. Menu tuj! H. Serup, Mygind, **Randers**, Danlando.

« **Tra Eŭropo per Esperanto** » (300-paĝa ilustrita verko) en finpreparo. Antaŭpagintoj de malpli ol unu dolaro aŭ egalvaloro volu tuj sendi la diferencon per poŝtaj respond-kuponoj internaciaj. La verkinto: I. H. Krestanov, str. 6 Septemvri 2, **Sofia**, Bulgarujo.

**Du junuloj deziras korespondi** kun gesamideanoj el la tuta mondo letere kaj poŝtkarte. Certa respondo garantiata, se la adresoj estas legeblaj. Olov Eliasson, Solgatan 5, Nya Hagaby, **Örebro**, kaj Harry Hultén, Parkgatan 3, **Örebro**, Svedujo.

**Juna sveda fraŭlino deziras korespondi** kun ĉiu ajn pri ĉio ajn. Tuj skribu al Ragnhild Åswald, **Skinnskatteberg**, Svedujo.

**Poŝtmarkojn interŝanĝi** kun Germanujo (precipe ankaŭ Aŭstrujo), Svedujo, Bulgarujo, Nederlando, Norvegujo kaj Ĉeĥoslovakio laŭ Michel-katalogo deziras s-ro Stjepan Cerančević, **Vinkovci**, Jugoslavujo.

**Grupanoj volas korespondi** kun seriozaj homoj en ĉiu parto de la mondo. Skribu unue al grupsekretario s-ro J. Humble, 5, Western Road, East Dene, **Rotherham** (Yorkshire), Anglujo.

**24-jara nederlanda esperantisto** deziras bildkartojn kaj leterojn el ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Hendrik Kamp, M. Buschstr. 75, **Delfzyl**, Nederlando. (550)

**Senpage publikigas adresojn de geknaboj**, kiuj deziras korespondi, la monata infanzeto « La Vojo ». Adreso Redakcio: Marathonweg 15, II., **Amsterdam**, Nederlando. (453)

**Mi deziras korespondi** kaj interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun gesperantistoj el ĉiuj landoj. S-ro Paul Isacsson, Brogård, **Vattholma**, Svedujo.

**Filatelistoj!** Mi interŝanĝas belgajn poŝtmarkojn. Sendu 50 aŭ 100 diversajn poŝtmarkojn kontraŭ samkvanto da mialandaj! Karel Istas, Capucienien Voer 74, **Leuven**, Belgujo.

**Du finnaj esperantistoj** volas korespondi pri diversaj temoj. Eino Tanner, Merimiehenk. 21.A.2; Eino Koponen, Jääkärik. 2.E.42, ambaŭ en **Helsinki**, Finnlando.

**Japana belartista** sincere deziras intiman amikigon kun ĉiulandaj artistoj kaj artamantoj. Adreso: S-ro Kozuki Josihiro, P.O.B. 16, Horie, **Osaka**, Japanujo.

**Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn** laŭ Michel aŭ pecoj por pecoj, kaj ilustritajn poŝtkartojn, kun esperantistoj ĉiulandaj. Arne Munters, **Dala-Järna**, Svedujo.

**Filatelistoj!** Por la novaj poŝtmarkoj de via lando vi ricevos la novajn de Germanujo, bonfarajn poŝtmarkojn. Bele afrankitajn aerpoŝtleterojn mi respondos same. Peter Becker, Friedrichstr. 1, **Mainz-Weisenau**, Germanujo.

**F-ino Maja Ahlström** deziras korespondi kun ĉiuj landoj, speciale Svislando, Francujo, Anglujo, Germanujo, Usono. Certe respondos. Adreso: Ståthållaregatan 26, **Göteborg**, Svedujo.

**Kvakerismo kaj Paco.** Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1**, Anglujo. (432)

**BES-Adresaro** (nova, 13-a eldono), kun centoj da adresoj de esperantistoj el pli ol 40 landoj, kaj kun 84 portretoj, estas ricevebla por 0.60 gld (inkl. sendkostoj) ĉe: Heroldo de Esperanto, **Scheveningen**, Nederlando. (523)

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgujo.

